

Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Podyplomowe Studium Interlingwistyki

**Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista
lingvoscienco kaj de esperantologio**

(Słowotwórstwo z punktu widzenia indoeuropeistyki i esperantologii)

Universitata diplomlaboraĵo

Cyril BROSC

Gvidanto: KOUTNY Ilona

Poznań 2008

Enhavo

Mallongigoj	3
1. Enkonduke	5
2. Celoj kaj strategioj de vortfarado	6
3. Vortfarado en hindeŭropaj lingvoj	8
3.1 Tradicia modelo – kritikaj punktoj	8
3.2 Propono por nova klasifiko	11
3.2.1 Kunmetaĵoj	12
3.2.2 Kunmetaj derivaĵoj	14
3.2.3 Aliaj formaĵoj	16
Ekskurso: Vortfarado ĉe la verbo	19
4. Vortfarado en Esperanto	21
4.1 Oficiala modelo de la Akademio kaj ties kritikoj	23
4.1.1 La morfemtipoj kaj la strukturo de la Esperanta vorto	24
4.1.2 La t.n. radikkaraktero	28
4.1.3 La t.n. vortefikaj reguloj	29
4.2 Alternativa klasifiko	31
5. Provo apliki la nociojn laŭ 3.2 al Esperanto	36
6. Konkludoj	38
Bibliografio	39
Apendico: Malgranda terminaro vortfarada <i>de – eo</i>	45
Zusammenfassung	47
Streszczenie	48

Mallongigoj¹

A	unua konstituento, flankelemento
ang.	angla
arm.	klasika armena
av.	avesta
B	dua konstituento, ĉefelemento
ĈE	ĉefelemento(j)
DK	determina(j) kunmetaĵo(j)
ék	<i>ént^heos</i> -kunmetaĵo(j)
f.	feminena
FE	flankelemento(j)
FG	Fundamenta Gramatiko (vd. la unuopajn versiojn en Zamenhof 1991)
fra.	franca
g.	genitivo
ger.	germana
gr.	greka (moderna)
hel.	helena
ha.	hindarja
he.	hindeŭropa
hit.	hitita
KPR	kunmetaĵo(j) de prepozicia rekcio
KVR	kunmetaĵo(j) de verba rekcio
KZ	<i>(Kuhns) Zeitschrift für vergleichende Sprachforschung</i> , Göttingen (poste HS).
l.c.	en la loko citita
lat.	latina
LIV	Rix k.a. (2001).
LR	Zamenhof (1992a).
m.	maskulena
mha.	malnovhindarja
n.	neŭtra

1 Ne aperas ĉi tie mallongigoj, kiuj estas ĝenerale konataj aŭ troviĝas en la *Bibliographie linguistique* (Tol/Olbertz 2006), nek tiuj, kiuj estas kunmetaĵoj kun konata ĉefelemento mallongigita (ekz. malnovger. = malnovgermana).

NVS	nominaligo de verba sintagmo
PAG	Kalocsay/Waringhien (1980).
phe.	prahindeŭropa
PIV	Sennacieca Asocio Tutmonda (2002).
PMEG	Wennergren (2008).
SK	senpera(j) konstituento(j)
Tekstaro	Wennergren (2008c).
toĥ.	toĥaraj lingvoj (A = orienta, B = okcidenta)

1. Enkonduke

Volante priskribi la lokon de la esperantologio ene de la lingvistiko, oni renkontas la ĝeneralan problemon, ke profesiajn lingvistojn plej ofte ne interesas Esperanto, kaj aliflanke la esperantologoj ofte ne sekvas la ĉeftendencojn de la moderna lingvistiko, se ili entute estas profesiuloj. Ĉi tiun distancon daŭrigas la manko de sciencaj gramatikoj priesperantaj en etnaj lingvoj kaj la manko de tia gramatiko esperantlingva, kiu estus komprenebla por neesperantistaj lingvistoj baze de rudimenta lingvokono.

Ĉi tiu laboraĵo ne estas kontrastiga verko en la senco, ke ĝi priskribas la vortfaradon de du lingvoj komparante la unuopajn trajtojn, sed esploro de la hindeŭropa kaj Esperanta nociaj sistemoj el la kampo de vortfarado, kies celo estas klarigi, ĉu indas aŭ entute eblas apliki la hindeŭropajn nociojn resp. terminojn al la sistemo de Esperanto, kiun la Esperanta tradicio lingvosciencia (PAG, PMEG) priskribas per propra, neinternacia terminaro. Nerekta efiko do povus esti priskriba modelo de la Esperanta vortfarado, kiu estas komprenebla por lingvistoj, kiuj ne apartenas al la Esperanto-movado.

En la hindeŭropa parto mi limigas min al la nominala (substantiva/adjektiva) vortfarado, por la verba vortfarado vd. ekz. por la prahindeŭropa la enkondukajn ĉapitrojn de LIV aŭ la koncizan superrigardon de Stepanowa/Fleischer (1985: 129-141) por la germana, kiun mi uzos kiel ekzemplon de moderna hindeŭropa lingvo, aldoniĝas ankaŭ kelkaj polaj kaj Esperantaj ekzemploj. La vortfarada produktiveco de la verbo en la malnovaj lingvoj apenaŭ transpaŝas la kampon de akcionalo, diatezo aŭ simpla verbigo de alia vortospeco – preskaŭ ĉio per sufiksa derivado –, kaj la priskribo de la modernaj lingvoj, pli riĉaj tiurilate, tre varias.

Specialan atenton mi donas al plurvortaj formaĵoj, ĉar ili estas precipe tiklaj, kaj aldone pli interesaj ol simplaj derivaĵoj – fakte ja ne estas disputeble, ĉu eblas transpreni bazajn kategoriojn semantikajn kiel „agad-substantivo“ por Esperanto, kaj iel apliki distingojn kiel „ostamoj“, „ant-stamoj“ ktp. por morfologie tute alia kaj pli klara lingvo kiel Esperanto ĉiuokaze estus sensece.

Temas do pri semantika esploro, kiu kompreneble ne traktas unuopajn formaĵojn, sed la t.n. vortfaradan signifon, do kian signifostrukturon havas difinita vortfarada tipo. Por klarigi la ĝeneralan sistemon tamen trakto de multaj specialaj okazoj estas neevitebla, ĉar nek en la hindeŭropa lingvoscienco nek en la esperantologio ekzistas klara kaj sendisputa teorio de la vortfarado.

2. Celoj kaj strategioj de vortfarado

Vortfarado estas memstara parto de lingvo kaj lingvoscienco, kie renkontiĝas leksiko kaj – per sintakso kaj morfologio – gramatiko². Ĝi estas rimedo por ekonomia lingva priskribo de la mondo, sen ĝi oni bezonus por ĉiu nova nocio tute novan vorton.

Unue necesas iom klarigi la vortfaradan nociaron kaj ĉi ties terminologion. Gravan distingon, pri kiu la faka literaturo ne sufiĉe klare atentigas, oni devas fari inter la celoj de vortfarado kaj la rimedoj por atingi ilin. La tri grandaj celoj estas sendependaj de la unuopa lingvo, mi nomas ilin „vortfaradaj sferoj“: a) transpono de vort(grup)o, do ŝanĝo de ĝia sintaksa uzo (ekz. substantivigo aŭ transitivigo de verbo), b) formado de nova nocio, aŭ per tute nova kreado (resp. prunteprenado), aŭ per modifo de esprimo jam ekzistanta, c) pliklarigo de signifo (ekz. per aldono de elemento al vorto, kiu mem ne sufiĉe kompreneblas). Speciala vortfarada procezo, la kurtvortigo (vd. sube), servas nur por la ĝenerala celo de ekonomio, ĉar ĝi nek ŝanĝas la signifon nek la kutiman uzon de la vorto³. Vortfarada formaĵo malsimilas al frazoj per tio, ke ĝi referencas al io (jam konata), dum frazoj priskribas ion (eble ankoraŭ ne konatan), kp. Günther (1981: 277s.).

La procezoj, t.e. estas la manieroj vortigi la senperajn konstituentojn⁴, por plenumi la vortfaradajn sferojn male povas tre varii depende de la lingvo, ekz. la pola uzas derivadon (*kupiec*), sed la germana kunmetadon (*Kaufmann*, *-mann* ĉi tie havas sian pli malnovan signifon 'homo') por formi la vorton *komercisto* el la verbo *aĉeti* (*kupić* resp. *kaufen*). Ĉiu el la ekkoneblaj procezoj difinas, kune kun kriterioj kiel akcento, vortospeco de la rezulto kaj vortfarada signifo, vortfaradan tipon, kaj la sinkronie produktivaj tipoj estas nomataj vortfaradaj modeloj

2 Kp. Brugmann (1906: 15-49) kaj Fleischer/Barz (1992: 1-3). Ne estas necese, ke oni limigu vortfaradon al la pluformado de lingva materialo jam ekzistanta, difinante propran kategorion de vortkreado (kp. Fleischer/Barz l.c.: 5s.). La difino uzata ĉi tie estas samtempe pli kaj malpli vasta ol tiu de PIV (319: „parto de la leksikologio, studanta la elementojn, el kiuj konsistas la vortoj de difinita lingvo, kaj la manierojn, kiel ili kombiniĝas inter si por formi pliajn novajn vortojn“).

3 Kelkaj pro tio pensas, ke entute ne temas pri vera vortfarado, sed pri sinonimoj (kp. Stepanowa/Fleischer 1985: 111), tamen ja ofte mallongigoj estas almenaŭ stile aŭ pragmatike markitaj (ekz. pola *uniwerek* anstataŭ *uniwersytet* 'universitato').

4 La SK (plej ofte du) estas morfemoj aŭ aroj da morfemoj – eĉ pluraj vortoj –, kiuj prezentas la maksimuman dividon de plurmorfema vorto (kp. Stepanowa/Fleischer l.c.: 93s., Fleischer/Barz 1992: 42, kaj aldone p. 51ss.), do ili estas ĉi ties plej grandaj partoj, ekz. *vaporŝipasocio* = *vaporŝip*- (kiu mem konsistas el du SK) + *asocio*.

(kp. Stepanowa/Fleischer 1985: 76s.). Rezulto de vortfarado nomiĝas (vortfarada) formaĵo, la jam menciita vortfarada signifo estas la abstrakta semantika rilato inter la konstituentoj de formaĵo. Fine la parafrazo estas la esprimo de (parto de) la signifo de vortfarada formaĵo per pluraj vortoj, ekz. *blondharulo* = persono, kiu havas blondajn harojn.

Oni povas klasifiki la vortfaradajn procezojn kombinante diversajn kriteriojn de la lingva esprimo (signifanto), nome ŝanĝiĝon (aŭ estiĝo) de formo kaj sintaksa rolo⁵, jene:

a) Per *Konverto* oni ŝanĝas la vortspecon – do la uzadon en la frazo –, ne aldonante aŭ forigante vortfaradajn morfemojn⁶.

b) *Implica derivado* derivas vortojn per ŝanĝo de ties morfemoj, ne aldonante aŭ forigante elementojn (ekz. per ablaŭto kiel en ger. *Wurf* 'ĵeto' de *werfen* 'ĵeti', Fleischer/Barz l.c.: 51).

c) Ekzistas tri procezoj, kie morfemoj estas aldonataj: a) *Kunmetado*, kie oni kombinas leksemojn, β) *eksplika derivado*, kie oni derivas vortojn per nememstaraj afiksoj, kaj γ) *duobligo*, kie la vorto aŭ ties parto estas ripetata (Fleischer/Barz l.c.: 45-48). Tamen distingo nur laŭ la kriterio de memstareco estas problemhava, ĉar ekzistas transira zono inter kunmetaĵoj kaj duobligaj formaĵoj (ĉe la t.n. iterativaj kunmetaĵoj aŭ amreditoj, vd. sube), kaj inter kunmetaĵoj kaj eksplikaj derivaĵoj (ekz. per la gramatikeriĝo de eksaj ĉefelementoj je afiksoj, kun intera stato de afiksoidoj, vd. sube). Montriĝos sube, ke kelkaj vortfaradaj tipoj, kiujn la lingvoscienco tradicie klasifikis kiel kunmetaĵojn, fakte apartenas al la kampo de derivado. Ortner/Ortner (1984: 12-39) liveras ampleksan katalogon de 16 kriterioj por kunmetaĵoj, kaj Kramer (1962) pritraktas la bazajn enhavajn diferencojn inter kunmetado kaj derivado⁷.

5 Kp. Brugmann (l.c.), Fleischer/Barz (l.c.: 46-52), Ortner/Ortner (1984: 109) kaj Stepanowa/Fleischer (l.c.: 109-111), kiuj faras parte malsamajn kategoriojn. Pli detalan klasifikon liveras kategorioj enhavaj (rigarde la signifaton), kp. la ekzemplon de rekaraktizaĵo kiel speciala formo de determina kunmetaĵo sube.

6 Ekzemploj por tute senŝanĝa konverto estas *la Patronia*, hel. *tò apot^haneîn* 'la morto' (*apot^haneîn* 'morti'), kp. Fleischer/Barz (l.c.: 48-50), sed samkategorias ankaŭ formoj kiel ger. *zufriedener* 'kontenta' (*zu Frieden* 'al paco') kaj hel. *íp^hios* 'perforta' (*íp^hi* 'per forto'), kie aldoniĝis fleksia finaĵo (kp. Brugmann l.c.: 33-35, li uzas la terminon „Hypostasen“, do transponaĵoj), kvankam ili ja enhavas morfemojn, kiuj implicas ŝanĝon de la baza vorto. Ĉi tiu laboraĵo uzas la terminon hipostazo por ĉiuj derivaĵoj de sintagmoj ekster la verbo (ĉi-lastaj estas NVS, vd. Ortner k.a. 1991: 121s.), kp. ankaŭ Risch (1974: 187-189), kiu tamen traktas la KPR aparte.

7 Sub ĉi tiu termino mi sekve sumigas implican kaj eksplikan derivadojn kaj retroformadon, ĉar ĉi ĉiuj ne plu realigas la signifon de la referencaĵo („realisieren [...] nicht mehr die Bedeutung der gemeinten Größe [...]“, Kramer 1962: 412), sed donas nur indikon pri la objekto aŭ ado, ne signifante ĝin mem aŭ donante al ĝi enhavon („nur noch einen Hinweis auf die Größe, die Bestimmung oder den Vorgang, ohne ihn (sie) selbst zu bezeichnen oder mit einem Inhalt zu versehen“, l.c.).

d) Same cê tri procezoj oni renkontas forigon aŭ mallongigon de elementoj: α) Ĉe *retroformado* vorto estas derivata per forigo aŭ interŝanĝo de vortfarada sufikso (Fleischer/ Barz l.c.: 51, ekz. ger. *notlanden* 'devige surteriĝi' de *Notlandung* 'deviga surteriĝo', kunmetaĵo el *Not* 'mizero, neceso' kaj *Landung* 'surteriĝo'); β) cê *kurtvortigo* (ekz. *aŭto* de *aŭtomobilo*, vd. Brugmann 1906: 40-45, Fleischer/Barz l.c.: 52); γ) Fine *vortfandon* (ekz. ang. *brunch*, ger. *Baro(c)koko*) oni povas kompreni kiel mikson de kunmetado (jen kien Fleischer/Barz l.c.: 47f., Ortner k.a. 1991 klasifikas ĝin) kaj kurtvortigo, ĉar unuflanke kombiniĝas du vortoj, aliflanke tamen ambaŭ perdas parton de siaj sonoj.

Afiksoj ĝenerale estas fonetike relative facilaj, povas formi longajn vicojn da derivaĵoj, kiuj havigas al diversaj morfemoj la saman t.n. vortfaradan signifon, ekz. ger. *-(er)ei* '-ejo' (kp. Blanke 1981: 31).

3. Vortfarado en hindeŭropaj lingvoj

Dum la laste cititaj procezoj estas tipaj por modernaj lingvoj, konverto, derivado (implica kaj eksplica), kunmetado kaj, malpli ofte, duobligo, aperas jam en malnovaj hindeŭropaj lingvoj, kompreneble diversgrade depende de la lingvo. Por ĝenerala priskribo kp. Delbrück (1900), Brugmann (1906), rilate unuopajn lingvojn precipe menciindas Wackernagel (1957; malnovhindarja) kaj Risch (1974; helena).

La hindeŭropa pralingvo, same la filiaj lingvoj, distingas kvar specojn de morfemoj: Radikoj (do bazaj morfemoj), afiksoj (t.e. plejparte vortfaradaj morfemoj; ĉe nominaloj aperas nur sufiksoj), finaĵoj (gramatikaj morfemoj) kaj partikloj (kp. parte pri tio Brugmann l.c.: 4-15). La fleksieblaj vortospecoj (nominaloj, verboj) konsistas el stamo (radiko + eventuale afikso(j)) kaj finaĵo, do nur la nefleksieblaj vortospecoj (partikloj, adverboj) povas esti memstaraj („sol-starivaj“), dum verboj kaj nominaloj estas konfiksoj⁸.

Kiom gravas la ĝusta analizo de la vortfaradaj tipoj, mi volas nun montri ekzemple de kompleksaj formaĵoj en la he. lingvoj, kies kutima priskribo lingvistika estas nekontentiga.

3.1 Tradicia modelo – kritikaj punktoj

Surbaze de la malnovhindarja lingvosciencia tradicio (kp. la terminojn sube) la hindeŭropistoj fine de la 19a jarcento elverkis sistemigon de la vortfaradaj procezoj, kies resumon donas la epokfara *Skizo de la kompara gramatiko de la hindeŭropaj lingvoj* de K. Brugmann (Brugmann 1906, pli nova verko de tioma amplekso daŭre mankas).

Ĉe la derivaĵo oni havas du eblajn ordigojn, laŭ formo (sufikso), aŭ laŭ signifo. Same kiel ekz. en la pola aŭ la germana hodiaŭ, ankaŭ en la malnovaj he. lingvoj ne ekzistas klara korelativo inter tiuj du kategorioj, kvankam ja por unuopaj sufiksoj oni ofte povas doni signifo(j)n (ekz. *-ter-: agant-substantivo), kaj por signifokampo oni povas indiki la konvena(j)n sufikso(j)n. Do, kiel estas kutime por etnolingvoj, trajto ankaŭ de la he. afiksoj estas polisemio (ekz. *-ter- formas ankaŭ nomojn de parencoj) kaj sinonimeco (ekz. kvaliton en la germana esprimas *-heit, -keit, -igkeit, -tum, -schaft...*), krome ĉiam povas okazi semantika ŝanĝiĝo, ekz. de agad-substantivo al agaĵ-substantivo (kp. *movado*). Brugmann (l.c.: 582-685) donas la jenan semantikajn kampojn (la esprima flanko ja ĉi tie ne atentindas, kp. la enkondukon), kiujn

8 Pri ĉi tiu nocio kp. Glück (2005: 336). Konfiksoj estas nememstaraj morfemoj, kiuj tamen povas esti bazo de plurmorfema vorto (derivaĵo aŭ kunmetaĵo) aŭ roli kiel afiksoj aŭ afiksoidoj.

ampleksas la derivado en la malnov-he. lingvoj: a) konkretaĵoj (598-625) kun la subdividoj vivantaĵoj, esprimo de parencoj, korpopartoj, plantoj, agant-substantivoj, iloj, ejoj, tempo-periodoj; b) abstraktaĵoj (626-644) kun verbaj abstraktaĵoj = agad-substantivoj, kaj kvalitaj abstraktaĵoj; c) kolektivaĵoj (644-649); d) adjektivaj sufiksoj (649-668), t.e. deverbaj nominaloj = participoj kaj verbaj adjektivoj, gradigo, lokeco, tempo, totaleco, koloroj, posedo kaj deveno = aparteneco, inklino; e) pragmatikaĵoj (668-685), do diminutivoj, karesnomoj, aŭgmentativoj kaj esprimoj de malestimo.

La kunmetaĵojn (resp. kion oni opiniis kunmetaĵoj) oni ordigis sekvamaniere⁹: a) Determinaj kunmetaĵoj, kies flankelemento en la parafrazo (ne laŭ la formo!) estas aŭ epiteta adjektivo aŭ substantivo en oblikva kazo – en la mha. terminologio¹⁰ oni parolas pri karmadarajoj (*karmadhāraya*) resp. tatpuruŝoj (*tatpuruṣa*)¹¹; b) en kombinaĵoj kunmetaĵoj aŭ dvandvoj (*dvandva*) la konstituentoj estas samrangaj, por ambaŭ tipoj vd. sube 3.2.1.; c) la bahuvrihiojn (*bahuvrīhi*) oni nomas ankaŭ posedaj kunmetaĵoj pro la ofta parafrazo „*AB* = kiu havas (malofte: donas) *A*-an *B*-on“; la tipo, same kiel la sekvantaj du, estas ekstercentra (a kaj b estas encentraj), tio signifas, ke la denotaĵo malsamas al la signifato de la formaĵo (kp. pri ĉi tiun problemon ĝenerale Brugmann l.c.: 71-76), ekz. ger. *Rotkehlchen* ne estas ruĝa gorĝeto, sed besto havanta ruĝan gorĝon (*ruĝgorĝulo*), same mha. *rājaputra*- 'havanta reĝajn idojn'; en la malnovhindarja gramatiko ne aperas la t.n. d) kunmetaĵoj de verba rekcio (regas la unua aŭ la dua konstituentoj) kaj la e) kunmetaĵoj de prepozicia rekcio, kiujn oni nomas ankaŭ hipostazoj aŭ derivad-kunmetaĵoj; al ili apartenas la mha. modelo de la *dvigu*-formaĵoj (kompareblas la tipo *dupunkto*, kp. Wackernagel 1957: 141f.), vd. por ĉio 3.2.2.; la lasta kutima tipo estas la iterativaj kunmetaĵoj aŭ amreditoj (*āmreḍita*, kp. en Esperanto *fojfoje*), vd. sube, 3.2.3.

Ĉi tiu klasifiko, kiun oni daŭre instruas ankaŭ hodiaŭ, el lingvistika vidpunkto tamen estas ko-

9 Brugmann (1906: 49-120, precipe 56-76). La plej detalan klasifikon tamen faris Pollak (1912b), kiu tamen preskaŭ ne ricevis atenton, kiel rimarkigas Salus (1965: 60).

10 Kp. pri tio Sadovski (2002). En la sekvo mi uzas plejparte la mha. terminojn, kiuj havas la avantaĝon nomi vortfaradajn tipojn, ne implicante jam analizon lingvistikan.

11 Ĉe la karmadarajoj la kapo (kutime ja la ĉefelemento) estas determinata kvalite/predikative („priskribe“), ĉe la tatpuruŝoj male – relative, ekz. ger. *Kunstwerk* 'artaĵo' („arta verko; verko, kiu estas arto“) – *Kunstfreund* 'artemulo' („amiko je/de/rilate al arto“). La tipoj ne estas ĉiam plene distingeblaj, kaj multajn ekzemplojn oni povas interpreti ambaŭmaniere (ekz. mha. *rājaputrā*- 'reĝido': „reĝeca filo“ aŭ „filo de reĝo“), oni do prave uzas ankaŭ unu ampleksan terminon. Estas proponite ĝeneralige parafrazi determinan kunmetaĵon per „*AB* = B el la vidpunkto A).

rektenda¹². Ĝi kunigas kiel kunmetaĵon simples ĉiujn vortfaradan tipojn, kies elementoj estas minimume du leksemoj¹³, ne atentante la principo malsamajn procezojn morfologiajn, kiuj estigas la unuopajn tipojn¹⁴. Sed tiu diverseco de la vortfaradaj modeloj gravas, ne nur el diakronia perspektivo¹⁵, sed ankaŭ el sinkronia.

Adekvata kaj kongrua klasifiko eblas nur surbaze de la procezoj, kiuj **senpere** kondukis al la respektiva vorto kompleksa, ne surbaze de meĥanika disigo de la vorto. Aliokaze oni ne povus distingi (en la gramatika priskribo) ekz. ger. *Strafbescheid* 'skriba sciigo pri puno' (kp. *Bescheid* 'sciigo') de *Straferlass* 'nuligo de puno' (de *eine Strafe erlassen* 'nuligi punon', ne de *Erlass* 'dekreto'). La unua estas kunmetaĵo el *Strafe* kaj *Bescheid*, la dua – konverto de kompleksa predikato¹⁶.

3.2 Propono por nova klasifiko

La bazaj morfologiaj procezoj, kiuj kondukas al kunmetaĵo, estas unuflanke kunŝoviĝo de vortoj sinsekvaj el frazo (PMEG: „frazetvorto“), aliflanke kunmetado (en malvasta senco) el la vortprovizo (PMEG: „kombino“)¹⁷. En multaj verkoj pri la temo oni renkontas diferencigon

12 „There is obviously a manifest weakness in the traditional classification.“ (Meissner/Tribulato 2002: 300).

13 Foje eĉ ne tio, kp. ekz. hel. *ore(s)ibátēs*, ger. *Bergsteiger* 'montogrimpanto' (Brugmann l.c.: 102): Ne ekzistas substantivo **bátēs* aŭ **Steiger* 'grimpisto'. Tradicie oni parolas pri elementoj, kiuj aperas nur en kunmetaĵoj (Wackernagel l.c.: 184s.)

14 Konsekvenco de tia klasifiko estas ekz. la problemo de encentreco kaj ekstercentreco, kiu malaperas, se oni ekkomprenas la bahuvrihiojn kiel kompleksajn derivaĵojn adjektivajn (vd. sube).

Kompreneble oni povas same klasifiki ĉiujn formaĵojn havantajn plurajn leksemojn, sed ne en kontrasto al derivaĵoj, ĉar tiel oni komparas du grupojn, kiuj estiĝis laŭ tute diversaj kriterioj.

15 Fakte ja deveno de iu vortfarada modelo povus esti duaranga el sinkronia vidpunkto, ĉar post sia estiĝo (eble en neatingebla pratempo) tiu povas resti senfine produktiva, kp. Brugmann (1981: 139: „Nachahmung von überlieferten Mustern“), Risch (1974: 181), Ortner/Ortner (1984: 130f.).

16 Same en la malnovhindarja formaĵoj enhavantaj *-yudh-* '(kontraŭ)batalanta' (kontraste al *yúdh-* f. 'batalo') k.m.a. ne estas „Determinativkomposita mit Nomen verbale als Hinterglied“ (Wackernagel 1957: 184), sed NVS/KVR (tiel jam principe Uhlich 2002: 405-407).

Por aldonaj kriterioj por difini kunmetaĵojn disde NVS (ekz. pli da leksikeriĝo) vd. Ortner et al. (l.c.: 121s.), Ortner/Ortner (1984: 41-47). Kompreneble ekzistas ankaŭ kazoj, kie ambaŭ interpretoj eblas, vd. Ortner/Ortner (l.c.: 40).

17 Ambaŭ procezojn oni trovas ankaŭ ĉe la derivado, nome, kiam temas pri plurvorta bazo (vd. sube). Tio tamen ne estas la ĉefa karakterizaĵo de derivado (vd. ĉ. 2). Kunŝoviĝo estas trajto ankaŭ de kunigaĵoj, kiuj tamen ne apartenas al la kampo de vortfarado (vd. sube).

de tiuj kaj ĉi tiuj formaĵoj kiel „malveraj kunmetaĵoj“ aŭ *Juxtaposita*, kontraste al la „veraj kunmetaĵoj“ aŭ „stamkunmetaĵoj“ (Brugmann 1981: 136, kp. Delbrück 1900: 140, Risch 1944/49: 6s.). Tiun distingon mi ne transprenas, ĉar ĝi diras nenion pri la vortfarada signifo de la unuopaj formaĵoj, kaj ankaŭ praktike ĝi ne estas ĉiam facile aplikebla, ĉar ofte oni ne scias la fonton de kunmetaĵaj elementoj aŭ pro analogio kunŝoviĝoj kaj kunmetaĵoj (malvastsence) ne plu estas distingeblaj¹⁸.

Sed dum oni povas klare vidi la rezulton de tia vortfarada procezo, kiu ampleksas du (aŭ pli) leksemojn, kaj karakterizi ĝin ekzemple laŭ la vortospeco de la konstituentoj (kp. la listigon ĉe Brugmann 1906: 52-56) aŭ laŭ la direkto de rekcio aŭ determino (kp. Pollak 1912b, Tischler 1979), la procezo mem kompreneble ne estas videbla – tio tiom pli validas por lingvoj mortaj – kaj oni devas ĝin rekonstrui per interpretado de ĝia rezulto laŭ semantikaj kaj formaj kriterioj.

Do povas nomiĝi kunmetaĵoj nur tiaj vortoj plurmorfemaj, kiuj enhavas minimume du leksemojn sen aldonaj afiksoj vortfaradaj¹⁹ kaj estas parafrazeblaj pli-malpli²⁰ per siaj elementoj. Krome, por paroli pri kunmetaĵa procezo ĉe konkreta formaĵo (ĉu per kunŝoviĝo, ĉu per kunmetado), krom la enhava unueco devas ekzisti ankaŭ iu forma kuneco (ekz. sur supersegmenta nivelo aŭ laŭ la sintaksa konduto), alie ne eblus distingi kunmetaĵojn de kolokaĵoj kiel *ruĝa beto* (ger. *rote Rübe*, vd. Ortner/Ortner l.c.: 16). La signalo de forma unueco ne nepre devas esti senfleksia flankelemento (tamen plej ofte estas), sed povas esti ankaŭ speciala prozodiaĵo, ekz. la akcento en ger. *Góttessgabe* 'dia donaĵo' (Brugmann 1981: 146) kontraste al la grupo *Góttess Gábe* (*Gábe Góttess*), aŭ kp. la tipon b) de la mha. dvandvoj (vd. sube).

Sekvas nun klasifiko de kunmetaĵoj kaj kunmet(ec)aj derivaĵoj. Por la priskribo mi uzas la kvar bazajn nociojn, kiujn enkondukis Pollak (1912b, kp. ankaŭ la pli klaran superrigardon ĉe Tischler 1979: 856s.): alkomenca resp. alfina determinoj, komenca resp. fina rekcioj. Deter-

18 Kp. ankaŭ Salus (1965: 60: „the division into “proper” and “improper” compounds has no valid basis in descriptive linguistics“) kaj Mikkola (1967: 19: „Es gibt also keine scharfe Grenzlinie zwischen der Zusammenrückung und Zusammensetzung.“).

19 Escepto estas pure meĥanikaj, senenhavaj aldoniĝoj kiel la oftaj interfiksoj en la germana (-s-, -e-, -en- k.a.) aŭ la transformo de preskaŭ ĉiuj ĉefelementoj al *iĵo*-stamoj en la litova, kp. *darbādienis* 'labortago' de *dienā* 'tago' (vd. Larsson 2002: 209s.).

20 Kompreneble kunmetaĵo ĉiam signifas pli ol la sumo de siaj elementoj, tio estas eĉ unu el la plej gravaj kriterioj por la distingo de produktoj de vortfarado disde sintaksaj grupoj, kp. Brugmann (1981: 138s.), Ortner/Ortner (l.c.: 23-27), Fleischer/Barz (l.c.: 15s.). Por pliaj diferencoj vd. Günther (1981: 227).

minantaj elementoj estas en la parafrazo epitetoj de la kapoj de la sintagmo²¹, regantaj elementoj male estas mem la kapo, de kiu dependas la memstara formo de la alia elemento. Jen superrigardo:

-alkomenca determino $A \leftarrow B$, ekz. hel. *^hippopótamos* (< *^híppos potámios*) 'hipopotamo',

-alfina determino $A \rightarrow B$, ekz. *domopordo* = pordo de domo,

-komenca rekcio $A > B$, ekz. pol. *lamistrąjk* 'strikrompanto' („kiu rompas strikon“),

-fina rekcio $A < B$, ekz. hel. *oikop^hóros* 'limako' („kiu portas sian domon“).

La klasifiko de la aliaj derivaĵoj kaj de la formaĵoj kun duobligo kompreneble povas resti senŝanĝa.

3.2.1 Kunmetaĵoj

Nominalaj kunmetaĵoj do estas ĉiuj nominaloj, kiuj senpere estiĝis per kunmetaĵa procezo. Ne gravas, ĉu tiuj vortoj servas por novaj nocioj, ĉu por la pliklarigo de jam ekzistantaj nocioj. Ĉe ĉi-lasta grupo temas pri rekarakterizaĵoj aŭ klarigaj kunmetaĵoj (ger. „verdeutlichende Komposita“ Ortner/Ortner 1984: 57f., vgl. Ortner et al. 1991: 113, Fleischer/Barz 1992: 125-127)²². Ja ankaŭ en tiuj okazoj validas la baza regulo „AB estas esence B“ (kp. Ortner/Ortner l.c.: 36f.), sed la flankelemento estas hiponimo de la ĉefelemento („AB estas A kaj B, ĉar A estas B“), do la unua ne pliprecizigas la duan.

La determinaj kunmetaĵoj (tatpuruŝoj kaj karmadarajoj, vd. supre), same la rekarakterizaĵoj, en la hindeŭropaj lingvoj kutime estas alfindeterminaj, ekz. phe. **dems-poti-* 'dommastro' (hel. *despótēs*), mha. *chāyātaru-* 'ombroarbo', hel. *akrópolis* 'kastelo' („alturbo“). Alkomencdeterminaj kunmetaĵoj estas tre maloftaj, kp. la hel. *^hippopótamos* supre, kiu ja sekundare estiĝis el kombino de substantivo kaj adjektivo (vd. Brugmann 1906: 100). La determinaj kunmetaĵoj estas la plej produktiva vortfarada modelo en la angla kaj germana lingvoj kaj ankaŭ abundis en la malnovhindarja, dum en la helena aŭ la slavaj lingvoj ili maloftas – tamen inter la malmultaj polaj kunmetaĵoj la plimulto ja estas tatpuruŝoj, kun pliiĝanta tendenco. Ili ankaŭ dominas en Esperanto (vd. 4), pro tio ĉi tie estu loko iom pli detale priskibi ĉi tiun tipon (kp. ankaŭ la klarigojn en 3.1 supre). Ortner/Ortner (1984: 12-39) ja donas 16 kriteriojn por

21 Ankaŭ en kunmetaĵo tiuj vortoj estas la kapo, ĉar ili determinas la sintaksan sintenon de la tuta formaĵo, vd. Ortner/Ortner (l.c.: 36).

22 Fakte temas pri du iomete malsamaj tipoj. Dum (la biologie malĝusta) ger. *Walfisch* „balen-fiŝo“ pliprecizigas la kutiman vorton *Wal* 'baleno', la elemento *Lind-* en ger. *Lindwurm* (speco de drako, *Wurm* 'vermo, drako') ne plu ekzistas kiel simpla vorto. Tamen ankaŭ ĉi-lastajn eblas sinkronie rigardi kunmetaĵoj, ĉar percepteblas strukturo (vd. Fleischer/Barz l.c.: 33s.). Diakronie temas pri la sama vortfarada tipo.

kunmetaĵoj (ne nur determinaj), el kiuj la plej gravaj estas: Forma unueco (unu ĉefakcento, nedisigblo; l.c.: 12-16), dukonstituenteco (l.c.: 16), subordigo en la interna sintakso, kiu videblas nur per la sinsekvo (kiu do ne estas ŝanĝebla; l.c.: 17-19), semantike kunmetaĵoj ne estas eksplicaj, mankas sintaksaj informoj (modo, tenso, kvanto ktp., l.c.: 19-23, respektive mankas finaĵoj ĉe la flankelemento, l.c.: 34s.), idiomiĝo (ekz. *altforno* ≠ *alta forno*, l.c.: 23-27), la ĉefelemento decidas pri la semantiko kaj sintaksa konduto de la kunmetaĵo (l.c.: 36s.), la flankelemento referencas al la ĝenerala speco, ne al unuopa ekzemplero (ekz. *aŭtovendisto* kutime estas *vendisto de aŭtoj*, ne *de iu difinita aŭto*, l.c.: 37s.), fine estas konstateble, ke pro la nocia unueco de kunmetaĵoj ne eblas referenci (per pronomo aŭ epiteto) al ties unuopaj konstituentoj, sed nur al la tuto (laŭforme tamen al la ĉefelemento), ekz. ne eblas diri **vilaĝa domposedanto, kiuj...* (por *posedanto de vilaĝaj domoj, kiuj...*, l.c.: 38s.). Por Esperanto oni povas kompari PMEG (§37.3) kaj PAG (387-389, 392, 436, 511).

Ĉe la kombinaj kunmetaĵoj aŭ dvandvoj ne ekzistas determino aŭ rekcio, la konstituentoj estas samrangaj kaj ne nepre nur du, ilia sinsekvo do povas variu kaj dependas de kutimo (vd. Ortner/Ortner 1984: 18s., Fleischer/Barz 1992: 128s.), kp. mha. *tráyodaša 'dek tri'*, gr. *γρναικό-παιδα* 'virinoj kaj infanoj', ger. *schwarz-weiß* 'nigra-blanka'. Veraj dvandvoj havas tiom da denotaĵoj, kiom elementoj (tamen metonimio eblas, kp. toĥ. *A akmal* „okulo-nazo“ = 'vizaĝo')²³. Sed krom sendubaj kunmetaĵoj kiel la ĵus menciitaj oni trovas en la hindiranaj lingvoj, foje ankaŭ en aliaj, la t.n. dualajn aŭ *devatā*-dvandvojn. Ili aperas diversforme kaj ĉiam signifas du entojn, ofte du diojn, ekz. mha. *mitrā várūnā* 'Mitro kaj Varuno' (apud *mitró várūnah* 'Mitro (kaj) Varuno', *mitró várūnaś ca* 'Mitro kaj Varuno', vd. Wackernagel l.c.: 151), av. *ahura miθra* 'Ahuro kaj Mitro' (vd. Brugmann l.c.: 59s., Wackernagel l.c.: 149-151), hel. (Homero) *Aktoriōne Molíone* 'Akteriono kaj Moliono', lat. *Uenerēs Cupīdinēsque* 'Logo kaj Avido', hit. *nahsarattes weritemas* 'timo kaj teroro' (Puhvel 1977). Laŭ Insler (1998: 225) en la malnovhindarja oni povas distingi tri tipojn: a) ambaŭ leksemoj havas propran akcenton kaj (dualan) finaĵon; b) estas unu akcento por ambaŭ; c) la unua leksemo krome perdis la fleksion. Insler (l.c.: 286-288) pravas, ke tipo a ne estas kunmetaĵoj, sed asindetaj grupoj, kvazaŭ „pradvandvoj“. Ilia sintaksa bazo estas laŭsenca konstruo, kiu aperas ankaŭ en la t.n. elipsaj dualoj/pluraloj (kp. hel. (Homero) *Aíante* 'Ajanto (kaj Teŭkro)', lat. *Cererēs* 'Ceres (kaj Proserpina)',

23 Pro tio la adiciaj kunmetaĵoj, kiel ger. *Dirndlkleid* 'dirndlo-robo' (Ortner/Ortner l.c.: 51-53) ne estas dvandvoj (kvankam ankaŭ iliaj konstituentoj estas samrangaj), ĉar ili havas nur unu denotaĵon, kiu kombinas trajtojn de ambaŭ elementoj, vd. pri tiuj ŝajndvandvoj, kiuj fakte estas karmadarajoj, Fanselow (1981: 116-128).

vd. Mikkola 1967: 36). En la pola ĉi tiu konstruo estas eĉ regula, kp. la ekzemplon „Do dzienikarstwa nie wróci już na pewno Sławomir Jeneralski. Obaj ze swoim klubowym kolegą z SLD Piotrem Gadzinowskim wierzyli w magię ostatniego miejsca na liście.“ (*Polityka* 44/2007: 34, substreki mi).

3.2.2 Kunmetaj derivaĵoj

Kunmetaj (aŭ kunmetecaj) derivaĵoj estas sekve ĉiuj aliaj nominalaj formaĵoj, kiuj enhavas plurajn leksemojn, kies kunŝoviĝon aŭ kunmetadon kaŭzis alia (ofte ankaŭ videbla²⁴) procezo vortfarada. Per la termino de PAG, temas pri derivaĵoj kun disfalaj flankelementoj.

Por la amreditoj, kiuj estas nek kunmetaĵoj nek kompleksaj derivaĵoj, vd. sube. Ĉi tie mi ordigas la kunmetajn derivaĵojn unue laŭ la sinkronia fonto de iliaj elementoj:

La plej grava grupo estas la bahuvrihioj, kiujn oni formas sur plurvorta bazo el la leksikono (aŭ malofte surbaze de ekzistanta kunmetaĵo). Simile kiel ĉe la dvandvoj oni devas distingi ĉi tie du grupojn: La bahuvrihioj de la moderna germana lingvo (k.a.; vd. Fabian 1931) kiel *Rotkehlchen* 'ruĝgorĝulo', *Dickkopf* 'obstinulo' („dikkapo“), *Blondschopf* 'blondhararulo' laŭ E. Coseriu estas simplaj determinaj kunmetaĵoj, kiuj esprimas origine la parton de io pli granda (ofte de persono) kaj poste metafore resp. metonimie la pli grandan aĵon mem. Ento do estas nomata *pars pro toto* laŭ iu karakteriza trajto, por kio oni ne nepre bezonas kunmetaĵon, ekz. per ger. *Glatze* 'kalvaĵo' oni povas nomi ankaŭ kalvulon, kp. Ortner/Ortner (1984: 62-67, 186), Ortner k.a. (1991: 115s.)²⁵.

Male, la malnovhindeŭropaj bahuvrihioj estas rilataj adjektivoj, kp. Meissner/Tribulato (2002: 296): „they are typically adjectives (indeed, this is argueably what ‘exocentric’ means)“ aŭ Wackernagel (1957: 273): „[bahuvrihioj estas] Zusammensetzungen, welche denjenigen Substantivbegriff näher bestimmen, oder, wenn substantiviert, selbst bezeichnen, dem der Begriff der Kompositionsglieder als charakteristisches Merkmal zukommt“. Temas do pri derivaĵoj,

24 La sufiksado ĉe hipostazoj, (*-o-, vd. Brugmann 1906: 109s.), kelkaj bahuvrihioj (*-o-, *-i-, *-jo-, vd. Brugmann l.c.: 112, Fabian 1931: 251) k.a. ekstercentraj vortoj estus superflua ĉe veraj kunmetaĵoj. Formaĵoj sen sufiksoj (ék, kelkaj bahuvrihioj, KVR, kp. Sommer 1948: 109f., 115) estas kompleksaj konvertoj, foje kun kontrastiga akcento. Tion oni vidas je la ŝanĝo de la vortospeco (vd. pri tio Lühr 2003), ĉar aliokaze ne ekzistus kaŭzo, ke vera kunŝoviĝo aŭ kunmetaĵo ekz. el la adverbo he. *en* 'ene' kaj la substantivo *páis* 'infano' iĝu kune adjektivo (*émpais* 'graveda', „kiu havas ene infanon“).

25 Tiun metonimiadon kelkaj (H. Osthoff, la frua Brugmann; kp. Fabian l.c.: 15-22) nomis „mutacio“ kaj opiniis la fonto de la malnov-he. bahuvrihioj, kio tamen estas pensebla nur en malmultaj okazoj (Fabian l.c.: 18).

parte eksplicaj, sed ofte ankaŭ kompleksaj konvertoj, kiam mankas sufikso. Kompreneble ne estas problemo substantivigi tian adjektivon²⁶.

La du tipoj estas relative facile distingeblaj, ĉar la substantivaj bahuvrihioj havas neŝanĝitan (kaj neŝanĝeblan) ĉefelementon, dum la adjektivaj estas fleksiataj kiel aliaj adjektivoj, kp. hel. *andró-morp^hos* m. f., *-on* n. 'havanta homan formon', (de *morp^hē* f. 'formo') kaj ger. *Mannsbild* 'vir(aĉ)o' (laŭvorte „aspekto de viro“). Ankaŭ la bahuvrihioj estas alfindeterminaj, por ŝajnaj esceptoj vd. Uhlich (1997).

Plia tipo estas la t.n. kunmetaĵoj de verba rekcio (Delbrück 1900: 139s., Brugmann l.c.: 61-68, Wackernagel l.c.: 174-232, 315-321, Risch 1974: 189-212), kiuj ĝuste estas nominaligo de predikato (verbo + komplemento). En la malnovhindeŭropaj lingvoj ekzistas du bazaj tipoj: Oftas finrekciaj KVR, ekz. mha. *rathes̥thá-* 'ĉaro-batalanto' („staranta sur la ĉaro“), hel. *dí-ptuk^s* 'dufoje faldita', lat. *carniurus* 'manĝanta viandon', malpli oftas komencrekiaj (kun kelkaj subtipoj, kiuj ankoraŭ ne ekzistis en la pralingvo), ekz. mha. *dātívāra-* 'donanta trezorojn', av. *vanatpəšana-* 'venkanta en la batalo', hel. *ark^hékakos* 'estiganta malbonon', lat. *exercipēs* 'ekzercanta la piedon'.

La unua tipo oftas ankaŭ en modernaj lingvoj, en la germana lingvoscienco ĝi nomiĝas *Zusammenbildung* („kunformiĝo“), kaj estas laŭ la difino de I. Trancré (ĉe Ortner k.a. 1991: 642), „Nominalisierung eines Prädikatsinhalts“, mi nomas ĝin *nominaligo de verba sintagmo* (NVS; kp. Ortner/Ortner l.c.: 41-47, Ortner k.a. l.c.: 121s., 641s.). Mi transprenas la terminon ankaŭ por la dua supra tipo, ĉar ĝi ne implicas kunmetaĵecon de la respektivaj formaĵoj. Ekzistas okazoj, kie oni povas analizi plurlekseman vorton kiel NVS aŭ kiel kunmetaĵon (kp. Brugmann l.c.: 62s. kaj Lindner 2003).

Plia grava tipo estas hipostazoj, laŭ la ĉi-tiea difino nominaligoj de sintagmoj ekster la predikato. Subtipo estas la komencrekiaj t.n. kunmetaĵoj de prepozicia rekcio, kp. mha. *ádhiartya-* 'surseĝa', hel. *énupnos* 'ensonĝa', lat. *interamnus* 'interrivera', ger. *Zwischeneiszeit* 'interglacia epoko' (vd. Brugmann l.c.: 68, Wackernagel l.c.: 308-315, Risch l.c.: 187s., Sadovski 1998, 2000). Ili ankoraŭ ne apartenas al la pralingvo (same kiel al la hitita, kiu ankaŭ malhavas tiun tipon), ĉar ilia sintaksa bazo estas prepoziciaj sintagmoj, kiuj evoluis nur en la unuopaj lingvoj. Dua, pli malnova tipo estas la t.n. *ént^heos*-kunmetaĵoj, kp. hel. *ént^heos* 'entuziasma' („havanta ene dion“), lat. *praeceps* 'kun la kapo antaŭen', malnov-altger. *unwāfan* 'senarmila' (vd. Brugmann l.c.: 66s., Sommer 1948: 109-115, Risch l.c.: 187, Sadovski l.c.).

26 Tial do ekz. mha. *ekakṣa-* ekzaktatraduke ne signifas 'kiu havas unu okulon', sed 'unuokula'/'unuokululo', same *rājaputra-* (vd. supre) estas 'la reĝida', „la ulo kun rilato al reĝa(j) ido(j)“.

La lasta ekzemplo montras, ke ankaŭ parto de la formaĵoj kun phe. *ĝ- 'ne-' (kp. Brugmann l.c.: 105s., same *sm̥- 'kun-, sam-') apartenas al la éK aŭ pli ĝenerale al la hipostazoj. La komuna sintaksa bazo estas sintagmoj²⁷ kiel **en d^hh₁sos* 'ene (estas) dio' > „ene dia“, **ne putros* 'ne (ekzistas) infano' > mha. *a-putrá-* 'seninfana'²⁸.

3.2.3 Aliaj formaĵoj

Same kiel la kunmetaĵoj, la kunigaĵoj – el sia sinsekvo en la frazo – trairis la procezon de kunŝoviĝo; sed ĉe ili ĉi tiu integriĝo ne havas rezulton, ne kondukas al nova nocio, la nova vorto de estas ekzakte la sumo de siaj konstituentoj²⁹. Ofte ankaŭ ne (plu) temas pri nominalo, kp. la grupon de germanaj lokaj adverboj, kiuj kombiniĝas kun la adverboj *her* kaj *hin* (k.a.), kiuj indikas movon al resp. de la parolanto, ekz. *dahin* 'ĉi tien' (for de mi), *dorther* 'de tie (al mi)'. Ilin mi ne priesploras ĉi tie, ĉar ili ne apartenas al iu vortfarada sfero.

Asindetaj elementoj, ekz. hit. *attas annas* 'patro kaj patrino' kompreneble povas iĝi kunmetaĵo, sed ili restas vortgrupoj tiel longe, kiel ambaŭ substantivoj havas proprajn akcenton kaj fleksion (vd. supre pri la dvandvoj), eĉ se ili havas nur unu denotaĵon. Kp. la tipon de la t.n. dunominaloj, kiu aperas en la latinidaj kaj slavaj lingvoj (kaj malofte en Esperanto), ekz. pol. *chłop-robotnik* (g. *chłopa-robotnika* ktp.) 'kamparano kaj laboristo', *wywiad rzeka* 'intervju-ego' (laŭvorte „intervjuo (kiel) rivero“), fra. *oiseau-mouche* 'kolibrio' („birdo-muŝo“), *membro-abonanto*, kp. Benveniste (1967: 17).

Tipo, kiu similas al duobligo, sed tamen ne apartenas al la vortfarado, estas la t.n. iterativaj kunmetaĵoj aŭ amreditoj (mha. *āmredīta*). Ili konsistas el plene duobligita oblikva formo (kutime lokativo) de nominalo (aŭ alia vorto) kaj havas distribuan signifon, ekz. hit. KASKAL-*si* KASKAL-*si* = **palsi palsi* 'ĉiuvoje' (*palsa-* 'vojo'), rusa *зде-зде* 'tie kaj tie' (*зде* 'kie'), arm. *mec-a-mec* 'grandega' (*mec* 'granda'), kp. precipe Delbrück (1900: 141-153), Brugmann (1906: 56-58), Wackernagel (1957: 142-148), kaj Dunkel (1981, kun plia literaturo). Ne temas pri kunmetaĵoj, sed pri adverbecaj formaĵoj, kiuj ne apartenas al iu vortfarada sfero³⁰: La vojo de

27 Eble temas origine pri parentezoj, kp. pri tio Humbach (1954).

28 Favoras tian analizon la fakto, ke ekz. en la helena la formaĵoj kun nea *a-* same kiel la éK neniam alprenas la sufikson *-o-* (vd. Sommer 1948: 115), dum la pli junaj KPR kutime montras sufiksadon.

29 Kp. Ortner k.a. (1991: 123, 693-716). La distingo inter kunigaĵoj kaj kunmetaĵoj ofte estas malfacila, precipe ĉe ekzemploj kiel ger. *Hohelied* 'Alta Kanto' (kp. Ortner/Ortner 1984: 34). Risch (1944/49: 6) prave parolas pri „estontaj kunmetaĵoj“, kiujn oni pli bonu distingu de adverbaj ekzemploj kiel la supre menciitaj el la germana.

30 Inter la elementojn povas eniĝi krome enklizaĵoj (vd. Delbrück l.c.: 141), ili do ankaŭ fonetike ne estas unu

hit. **palsi* *palsi* kvalite aŭ nocie ne estas io alia ol de la simpla vorto *palsa-*; oni do ne formas novajn nociojn, la iterado ĉi tie prefere estas rimedo morfosintaksa.

Ĉefine mi rimarkigu, ke la alternativa klasifiko prezentita ĉi tie ne estas rezulto de nova ekono, sed de konsekvenceco. Implice aŭ eksplice la nesufiĉo de la klasika modelo jam konstatablas en la verkoj de antaŭ cent jaroj. La tiamaj hindeŭropistoj tamen difinis kunmetadon tiom vasta, ke distingo de kunmetaĵoj kaj kaj kunmetaj derivaĵoj ne estis ebla. Sed jam Brugmann (1906: 98) parolas pri „eine Art von Ableitung darstellenden exozentrischen Komposita“! Laŭ Sommer (1948: 108) la hipostazoj estas „Adjektivierungen von Grund aus“. Meissner/Tribulato (2002: 294) ja distingas inter la KVR kaj la kunmetaĵoj proprasence („compounds with a verbal member [...], to be distinguished from nominal compounds“), ĉi-unuajn ili tamen daŭre nomas kunmetaĵoj (de kia speco?). Eblus aldoni pliajn ekzemplojn.

Tikla punkto restas la t.n. afiksoidoj (aŭ „duonafiksoj“). Kvankam ili estas precipe bone pristuditaj en la germana pro ĉi ties riĉa vortfarada sistemo (vd. pri ĉio Stepanowa/Fleischer 1985: 141-147), temas pri fenomenoj trovebla en ĉiu lingvo, kiu havas kunmetadajn kaj derivadajn modelojn.

Afiksoidoj estas elementoj de kunmetaĵoj, kiuj ŝanĝiĝis semantike kompare al la memstara uzo; tiu ŝanĝiĝo kutime signifas perdon de kelkaj semantikaj trajtoj favore al pli ĝenerala (aŭ iom alia) signifo en la kunmetaĵo. Multaj afiksoidoj ankaŭ aperas en pli da formaĵoj ol aliaj kunmetaj elementoj³¹. Ĉi ĉio signifas, ke etimologie (sed ankaŭ el sinkronia vidpunkto) la afiksoidoj ŝajnas esti vortoj formantaj kunmetaĵojn, tamen el funkcia vidpunkto ili kondukas pli kiel afiksoj, kaj vortoj enhavantaj afiksoidojn estas derivaĵoj. Komparu la elementojn ger. *-zeug*, kiu tre similas al Esperanta *ilo* (kp. *Flugzeug* 'aviadilo', *Spielzeug* 'ludilo(j)'), dum la memstara *Zeug* signifas 'aĵ(aĉ)oj', aŭ *Haupt*, arkaiĝantan vorton por 'kapo', kiu kiel prefiksoido signifas 'ĉef-' (*Hauptstadt* 'ĉefurbo', *Hauptsache* 'ĉefaĵo').

Estas konate, ke kelkaj afiksoj etimologie devenas de kunmetaj elementoj (ekz. ger. *-heit*

vorto. La distingo inter ili kaj kunmetaĵoj tamen povas esti malfacila, ĉar precipe la amreditoj baziĝantaj sur nedeklinacieblaj vortoj malhavas la distingon kazo-finaĵon. Esperantajn adverbojn kiel *fojfoje* oni povas trakti same.

31 Tio tamen ne signifas, ke ĉiu ofta kunmeta elemento estas afiksoido; ekzistas okazoj, ke ofta tia vorto en kunmetaĵoj havas ekzakte la saman signifon kiel en memstara uzo, kp. la ekzemplon de ger. *Nadel* 'pinglo, kudrilo, broĉo, nadlo' ĉe Stepanowa/Fleischer (l.c.: 146). La distinga trajto estas la parafrazo: Afiksoidojn oni kutime devas anstataŭigi per alia vorto, ekz. *Flugzeug* = *Mittel* (ne *Zeug!*) *zum Fliegen*.

'eco', kp. gotan *haidus* 'maniero'; la transitiviga prefikso ger. *be-* havas la saman originon kiel la prepozicio *bei* 'ĉe'), do afiksoidoj prezentas (etimologie-diakronie kaj funkcie-sinkronie) mezan staton inter puraj kunmetadaj konstituentoj kaj afiksoj, perdinte sian originan signifon, sed havante ankoraŭ ligo al memstara vorto. Ili plene iĝas afiksoj, kiam tiu ligo perdiĝas – pro fonetikaj ŝanĝiĝoj (kp. *be-*) aŭ pro foriĝo de la bazo (kp. *-heit*).

La perdo de konkreta signifo favore al abstraktiĝo kompreneble ne estas sistemige priskribebla, sed oni povas ĝenerale situigi la afiksojn en meza pozicio en la gamo, kies finojn markas la maksimume konkretaj kaj minimume abstraktaj kunmetaĵoj unuflanke kaj aliflanke la minimume konkretaj kaj maksimume abstraktaj finaĵoj gramatikaj; ne ekzistas veraj limoj inter ili³², kaj ĉe unuopaj morfemoj la aljuĝo al unu el la konvenciaj kategorioj afiksoj – afiksoidoj – kunmetaĵaj konstituentoj povas esti diskutebla.

Ekskurso: Vortfarado ĉe la verbo

Jam estas dirite, ke origine ne ekzistis riĉa vortfarada sistemo ĉe la hindeŭropa verbo, kaj – alie ol en nunaj lingvoj kiel la latinidaj, ĝermanaj aŭ slavaj – apenaŭ troveblas prefiksoj³³. Kiel do estiĝis la tipoj kiel lat. *rēdeo* 'reiri', hel. *apoth'éō* 'forkuri', ger. *hinlaufen* 'alkuri' kaj pola *przejsć* 'trapaŝi' laŭ similaj modeloj (por la germana kp. Stepanowa/Fleischer 1985: 136-141)?

La evoluon bone montras la hitita. Kp. la frazon *nu siunas hāssui pēran huwāi* (*siuna-* 'diaĵo', *hāssu-* 'reĝo', *pēran* 'antaŭ', *huye-* 'iri'); depende de tio, ĉu oni komprenas *pēran* kiel postpozicion (la hitita ne havas prepoziciojn), verban prefikson aŭ lokan adverbon, oni povus traduki 'la diaĵo iras (helpe) antaŭ la reĝo', 'la diaĵo (helpe) antaŭiras la reĝon' aŭ 'la diaĵo iras (helpe) antaŭe ĉeeste de la reĝo' (la phe. dativo origine indikas plian, memstaran aktanton). La lasta traduko verŝajne respegulas la plej malnovan ŝtupon, sed ne daŭris longe, ĝis oni rilatigis la adverbon aŭ al la antaŭa dativo (per tio forpuŝante la originan genitivan rekcion de la homonima postpozicio³⁴) aŭ al la verbo, kreante kunmetaĵon *pēran huye-* 'antaŭiri', kiun oni povis ankaŭ substantivigi, kp. *pēran huyatalla-* 'helpanto' („antaŭiranto“).

32 La adverba markilo *-e* en Esperanto ekzemple estas pli konkreta, precipe en sia alativa formo *-en*, ol ekz. la *-o* de la substantivoj. Same *-aĵo* estas pli abstrakta ol *-estro* ktp.

33 Rara ekzemplo estas **uo-* 'for' en hit. *watku-* '(for)salti' (*/ua-tk^v-/*, de phe. **tek^w-* 'kuri, flui', vd. LIV: 620f.).

34 Kp. malnovhit. **hāssuwas pēran* 'antaŭ la reĝo'; *pēran* (k.a. postpozicioj) regas la genitivon, ĉar la vorto verŝajne devenas de neŭtra substantivo, signifis do komence '(en) la antaŭo', kp. ankaŭ la esprimon *pēran-tet* 'antaŭ vi' (laŭvorte „(en) via antaŭo“, kun enkliza poseda pronomo).

Ĉar la sintaksa bazo de ĉi tiu procezo devenis el la he. pralingvo, ĝi okazis en pluraj he. filiaj lingvoj. Kaj kiel ĉe la nominalaj kunmetaĵoj, multaj formaĵoj poste idiomiĝis, la flankelementoj perdis sian originan signifon aŭ foriĝis en memstara uzo, tiel estiĝante prefiksoidoj kaj fine prefiksoj.

Verbigo de nominalaj kunmetaĵoj aldone estigis modelojn por la formado de kunmetaĵoj el adjektivo/substantivo kaj verbo, pligrandigante la vortfaradan gamon de la verbo, kiu tamen ankoraŭ ne kompareblas kun tiu de la substantivo, kaj kvalite kaj kvante – ekz. apenaŭ ekzistas kunmetaĵoj de la tipo verbo + verbo, dum verbo + substantivo estas ofta (ekz. ger. *Backofen* 'bakforno').

4. Vortfarado en Esperanto

„la Fundamento ekzistas por stabiligi la lingvon, ne por difini kiel oni rajtas ĝin priskribi“ (Lindstedt 1982/83, tria parto)

Ĉi tiun eldiron oni povas samtempe akcepti kaj malakcepti. La Fundamento ja ne estas scienca gramatiko, tamen estas necese atenti la sencon de la FG, eble helpe de la LR. Ekzemple se vortfarada formaĵo ne kongruas kun la regulo pri vortoj kunmetitaj de §11 FG, ĝi laŭdifine ne estas kunmetaĵo – tio ne signifas, ke ĝi estas erara, ĉar la paragrafo ne diras, ke ne povas ekzisti ankaŭ aliaj tipoj de vortfarado en Esperanto, sed nur, kiel aspektu la kunmetaĵoj³⁵.

Oni trovas nur malmultajn eksplicajn regulojn pri vortfarado en la Fundamento – la jam citita §11 FG kaj kelkaj frazoj el §27 de la Ekzercaro – ĉion alian oni devas abstrakti el la modeloj, kiujn liveris Zamenhof. Ĉe tio oni devas ĉiam esti konsciaj, ke li uzis antaŭsciencajn kaj nekoherajn terminojn (kp. Schubert 1989b: 251-254), oni do ne rajtas bazigi sian teorion sur laŭvorta interpreto, kiel faris la Analiza Skolo rilate laŭdire allaseblajn kaj malpermesitajn flank-elementojn (vd. Eichholz 1990b). Sekvas eta listo de la plej gravaj principoj de la Esperanta vortfarado, kiuj ne estas eksplicitaj en la Fundamento, sed tamen videblaj:

- 1.) Encentreco (vd. supre 3.1): La signifato de vortfarada formaĵo devas eksplice rilati al la denotaĵo, ekz. *blondhararu*lo por persono havanta blondan hararon (dum en multaj he. lingvoj sufiĉus **blondhararo*), kp. Blanke (1981: 48).
- 2.) Plenumo de vortfarada sfero (vd. supre 2): Formaĵo devas formi novan nocion aŭ almenaŭ ŝanĝi la vortospecon; pro tio ne ekzistas *bluokulo* aŭ *leterskribi* en la senco „blua okulo“ resp. „skribi certan leteron“ (kp. PMEG: §37.3, Malovec 1999: §4.12)³⁶.
- 3.) Kategorieco: Ĉar la t.n. kategoriataj finaĵoj servas por signado de la sintaksa konduto (vortospeco), kaj vorto en teksto povas havi nur unu vortospecon, fine de vorto povas aperi logike nur unu kategoria finaĵo. En la vortmezo ili ja entute ne aperu, tamen oni trovas *-o-*, *-a-*, *-e-*, kaj *-i-* (sed ne *-as-* ktp.³⁷); sed, kiel montriĝos poste, la tri lastaj troviĝas nur en formaĵoj, kies

35 Pri la demando baza kaj ne facile decidebla, ĉu ĉio, kio ne enestas en la FG, estas malpermesata aŭ ne, kp. la koncernajn paragrafojn en la tre leginda verko de H. Welger (Velger 1994).

36 Laŭ tio vortoj kiel *dometo* en la senco „eta domo“ fakte estas neĝustaj. Zamenhof eĉ eksplice diras tion pri la tre simila sufikso *-eg-* (LR: 18s.), kiun oni ne uzu nur en la senco „granda“, sed „por kreado de vortoj *novaj* kun senco *speciala*“ (l.c.: 18; kursivo en la originalo) – kp. *pordego*, kiu ne estas iu ajn „ega pordo“. Zamenhof tamen koncedas, ke depende de la parolanto la opinio, ĉu jam temas pri nova nocio aŭ ne, povas varii.

37 Krom en la marĝenaj nominaligoj de citaĵoj kiel *neforĝesumino* (kalkeo de ger. *Vergissmeinnicht*) aŭ *vivui* (de lat. *uiuat*, kp. PMEG: §37.4).

bazo estas sintagmo, de kie ili do estas transprenataj, perdante sian sintaksan funkcion. Iom alie aspektas kun *-o-*, kiu aperas fakultative (kutime por faciligo de la elparolo, ekz. en *vort(o)speco*) en veraj kunmetaĵoj, kies bazo ne estas la sintaksa sinsekvo, sed la abstrakta vortprovizo. Ĉar ĝi ne plenumas (vort-)sintaksan funkcion (vd. sube 4.1.3) kaj aperas ĉe la plej diversaj FE, oni apenaŭ povas paroli pri la konservo de la kategorisufikso, sed prefere opiniu ĝin interfikso (laŭ la modelo de la helena kaj slavaj lingvoj, kp. hel. *akrópolis*, polan *parostatek* k.m.a.); same opinias Miner (2006: 6.0: „defaŭlta ligovokalo“), gravan objekton al ĉi tiu kompreno de *-o-* tamen li faras mem (Miner 2003: 1.0, laŭ B. Wennergren): En formaĵoj kun adjektiva FE (ekz. *dikfingro*) oni ne povas uzi *-o-*, do ŝajne ĝi tamen havas ian signifon³⁸. Mi devas lasi la problemon provizore nesolvita. Speciala okazo estas la alativa finaĵo *-en*³⁹ de adverboj, kiu parte persistas, parte foriĝas, sen videbla kaŭzo (*flankeniri*, *supreniĝi* sed *deflankiĝi*, *alsupra*, kp. PAG 418s.), verŝajne temas pri tradicio, ne pri iu gramatika fenomeno; pri prepozicioj en tiu funkcio vd. sube 4.1.

4.) Principo de renverseblo: Reiro al iu baza formo redonas la originalan signifon de la baza formo – alivorte: ŝanĝon de signifo aŭ funkcio devas akompani ŝanĝo de formo. Do principe ne eblas la vortfarada procezo de konverto, ĉar la kategoriaj finaĵoj estas samtempe vortfaradaj kaj gramatikaj morfemoj (kp. de Saussure 1982: 60-63).

Ĉe la sekva punkto ne temas pri iu principo, sed ĝi same gravas: Ankaŭ Esperanto distingas vortfaradajn tipojn kaj modelojn (vd. supre 2). Ne produktiva, tamen analizebla estas parto de la morfologio ĉe la t.n. fermitaj vortospecoj: Ekz. la tabelvortoj videble konsistas el stamo, kiu portas iom abstraktan signifon (demando/rilato, montrado, ĝeneraligo, nedifiniteco kaj neado) kaj modifantaj finaĵoj, vd. la lingvan respondon pri *neniigi* (LR: 35s.), kie Zamenhof klarigas, ke temas pri radikoj kaj „finaĵoj“, kiuj – krom *-o* kaj *-a* – estas tamen kunigitaj „*nedisigeble*“ (l.c.: 35, kursivo en la originalo) kaj ne povas servi kiel modelo por novaj vortoj (kiujn oni tamen trovas, ekz. **alies*). Sed ankaŭ la posedaj pronomoj kaj la ordaj numeraloj – ambaŭ kun *-a*, kiuj estas homonimaj kun la finaĵo de la adjektivoj, sed tamen funkcie nur parte identaj (vd. iom poste) – montras specialajn tipojn.

38 Por harfendado: Eĉ se ĝi estus nur interfikso, ĝi ja havus funkcion, malgraŭ la ofta opinio, ke interfiksoj ne havas signifon (kaj sekve ne estas morfemoj), – ili ja signas junton kaj per tio kompleksan vorton, do rekte helpas la analizon de la lingva signo.

Savo de la interfiksa kompreno de *-o-* povus esti la (spekulativa) supozo, ke la germana liveris la strukturan modelon (dum la fonetika estis la helena kaj slavaj lingvoj), ĝi nome ne uzas interfiksojn ĉe adjektiva FE.

39 Oni prefere distingu ĝin de la objektkaza finaĵo *-n*, kp. Verloren van Themaat (1972: 125, piednoto 1).

Ĉar vortfaradaj formaĵoj kutime estas binaraj, do konsistas el du senperaj konstituentoj (pri la nocio vd. supre, piednoto 4)⁴⁰, ne estas necese fari distingon inter du- kaj plurelementaj formaĵoj (kp. PAG: 415). Parenteze, Cherpillod (1996: 23s.) prave atentigas, ke oni povas dividi vortojn kun pluraj morfemoj nur laŭsence (ekz. *vaporŝip-asocio*, ne *vapor-ŝipasocio*), ne ekzistas morfologia markilo por la junto troviĝanta ĝuste inter la SK.

Unu baza vortfarada procezo en la ĉi-sekva pritrakto de la Esperanta vortfarado ne aperas, la vortokreado pere de prunteprenoj. Ĝi efektiviĝas laŭ §15 FG kaj por Esperanto ja estas sistemsistiga („systembildend“, Blanke l.c.: 50), tamen el morfologia vidpunkto ĝi estas neregula kaj nepriskribebla.

Laste, sed ne balaste, oni devas akcepti, ke ankaŭ en Esperanto ekzistas esceptoj aŭ specialaj okazoj, kiujn mi sekve ne devas klarigi, ĉar en ĉi tiu laboraĵo interesas la produktivaj modeloj: En *unua, mia* ks. (vd. supre) la finaĵoj havas specialan funkcion kaj pro tio persistas en vortfaradaj formaĵoj (ekz. *unuaeco*, kiu estas io alia ol *unueco*, kp. Mattos 1987b: 199). Esceptoj estas *posteulo* (evito de homonimo kun *postulo*) kaj – malgraŭ la elirprovo de Mattos (l.c.: 198) – la signifo de la substantivaj participoj (kp. PAG 440: „lingva konvencio“). Finfine duklasajn radikojn, do radikojn, kies radikkaraktero (vs. sube 4.1.2) ŝanĝiĝis en la diakronio de la lingvo (ekz. *flor'*, *rekrut'*), mi flankenlasas, kvankam temas pri interesa esplorkampo (kp. Cherpillod l.c.: 9s., Wennergren 2008b).

4.1 Oficiala modelo de la Akademio kaj ties kritikoj

Ĉi tie mi ne volas aŭ povas fari referaĵon de la historio de la privortfaradaj esperantologiaj studoj – la plej gravaj kontribuoj troviĝas rekte aŭ pere en la bibliografio, kp. la bibliografion en de Saussure (1982: 84-90) kaj precipe pri la Ido-krizo PAG (382-385) – sed nur pridiskuti la plej gravajn punktojn de la vort-teorio akceptita ĝenerale (PAG, A. Cherpillod, parte PMEG, K. Schubert, M. Malovec k.m.a.) kaj agnoskita oficiale (Akademio de Esperanto 1968: 55-68). Ĝin mem oni trovas plej detale en PAG (367-528) kaj koncize en la broŝuro de Cherpillod (1996). Sed aras ankaŭ la kritikantoj (Ĉefeĉ, P. Janton, Szerdahelyi I., M. Duc Goinaz) de ĉi tiuj pozicioj, kiuj (la kritikantoj) ricevos iom da loko en la sekvaj tri subĉapitroj. Unue oni devas priparoli, el kiaj morfemoj konsistas Esperanto. Tio estas demando laŭprincipe sendependa de la vortfarado, tamen la efektiva stato de la morfemaro ja estas esenca por

40 Escepto estas la dvandvoj, kiuj ne havas internan strukturon kaj pro tio povas esti tiom longaj, kiom povas produkti la parolanto (en klerula sanskrito oni trovas pli-ol-20-elementan dvandvon).

la tipologia priskribo de la lingvo, precipe en lingvo kiel Esperanto, kie ekzistas nur malgranda nombro de unumorfemaj vortoj. Plie, por la kunigo de la morfemoj, kiun en Esperanto baze determinas semantikaj kondiĉoj, ne fonologiaj aŭ aliaj (kp. Blanke 1981: 37-40), laŭ la PAG-a teorio tre gravas du principoj: La gramatika karaktero de la radikoj, do ke jam la morfemoj apartenas al difinita vortospeco, kaj la vortefikaj reguloj, do ke en kunmetaĵoj la karaktero de unu elemento estas determinata de alia⁴¹.

4.1.1 La morfemtipoj kaj la strukturo de la Esperanta vorto

Kvankam Esperanto estas morfologie nekomplika lingvo (por ĝenerala tipologia priskribo vd. la koncernajn ĉapitrojn de Wells 1989), oni trovas konsiderindan aron da klasifikoj por ĝiaj morfemoj⁴² (Akademio de Esperanto 1968: 63s., Szerdahelyi 1976b: 92s., Rokicki 1984b: 134, Schubert 1989b: 260s.), kio havas sekvojn por la vortfarado. Tio tamen ne mirigu, ĉar por la morfemoj ja eblas tiom da diversaj klasifikoj, kiom da kriterioj oni havas. Kaj ĉar ekz. memstareco (aŭ sekve la terminologion de PAG „solstarivo“) kaj morfemklaso („radikkaraktero“) ne dependas unu de la alia, jam laŭ tio, kiun el ambaŭ oni prenas kiel unuan dividokriterion, oni ricevas diversajn modelojn. Oni prenu por ĉi tiu laboraĵo kompreneble tiun, kiu plej konvenas el vortfarada vidpunkto, sed tio estas pli komplika, ol ĝi sonas, ĉar fakte ĉiuj el la menciitaj klasifikoj havas diversajn malavantaĝojn: La modelo de Schubert (radikoj, afiksoidoj, afiksoj, finaĵoj, fleksiaj morfemoj kaj sendependaj morfemoj) estas tro simpla, ĉar en la lasta grupo troviĝas kaj *la* kaj *du*, kiuj ja kondutas malsimile en la vortfarado (*la* neniam ligiĝas kun alia morfemo). La modelo de la Akademio dividas unue radikojn kaj ne-radikojn, ne donante la kriteriojn, kiuj ebligas ĉi tiun distingon. Poste ĉiu elemento estas difinita laŭ la radikkaraktero (resp. ĝia foresto) kaj „specialaj reguloj“. Entute la klasifiko faras malkoheran impreson, ekz. en unu komuna kategorio troviĝas la verbaj finaĵoj, la sufiksoido *-ig-*, la prepozicio *per* kaj la interjekcio *ve*. Pli kompreneblan sistemigon skizas Szerdahelyi, sed lia distingo de aŭtonomaj, duonaŭtonomaj kaj neaŭtonomaj morfemoj estas iom difuza, ĉar li ne donas klarajn kriteriojn por ili – fakte temas ja pri gamo inter [+semantika -funkcia] kaj [-semantika +funkcia], kie ĉiu divido estas arbitra. Tre detalan sistemon ellaboris Rokicki: Ĝi enhavas la bazan distingon de ligeblaj kaj neligeblaj morfemoj⁴³, sed poste iom stumblas ĉe la plia divido

41 Ĉar tiu efiko validas inter morfemoj, ne vortoj, Schubert (1989b: 261) prave uzas la terminon „morfemefiko“.

42 Nin ĉi tie ne interesas la demando de vortospecoj, kiu en Esperanto – dank' al la kategoriaj finaĵoj – estas sen la grandaj problemoj, kiujn ĝi starigas en multaj etnolingvoj; kp. Duc Goninaz (1987: 146).

43 Ĉi-lastaj kompreneble estas memstaraj. La du grupoj tamen ŝajne ne estas disigitaj cimente, kiel montras la

de la nememstaraj ligeblaj morfemoj: En la grupo de la nederivaj morfemoj li distingas la radikojn disde la afiksoidoj per laŭdira regulo de kromakcento (p. 133), kiu ne funkcias, ĉar la *kalkulilo* kaj *kalkulmaŝino* akcente ne diferencas pro diversa morfemkonsisto, sed pro la malsama longo, ne ekzistas regulo (nek normo), ĉu kaj kiuloke oni elparolu kromakcenton ĉe *kalkulmaŝino*⁴⁴. La t.n. derivaj morfemoj (*-log-*, *-iv-*) entute ne estas morfemoj en Esperanto, sed nur en la fontolingvoj. Fine mi ne komprenas, kial *-e* aperas kaj kiel kategoria kaj kiel fleksia finaĵo: La klariga piednoto ŝajne estas ial nekompleta. La grupigo de ĉi-lastaj du grupoj kiel „sintaksaj“ estas terminologie nekonsilinda, ĉar ĝi preteratentas la vortfaradan funkcion de la vort-kategoriaj finaĵoj.

Mi opinias, ke la (ne)kapablo aŭ (ne)devo kombiniĝi kun aliaj morfemoj estas bona bazo por morfema klasifiko, en kombino kun la alia klara distingo, memstareco⁴⁵; do la plej superaj du niveloj de Rokicki povas resti. Ĉe la nememstaraj ligeblaj morfemoj oni trovas tiajn, kiuj povas esti kerno de simpla vorto, dum aliaj ne povas (ekz. eblas *domo*, *igi*, *eta*, sed ne **jo* = pluralo aŭ **njo* = karulino). Ĉi-lastan grupon konsistigas la vortkategoriaj kaj fleksiaj finaĵoj, kiujn oni mem povas disigi laŭ tio, ĉu ili nepre fermas la vortojn (la fleksiaj finaĵoj) aŭ ne⁴⁶, kaj la morfemoj *bo-*, *-ĉj-* kaj *-nj-*; ĉi tiujn tri oni povas nomi vortfaradaj afiksoj, ili distingiĝas de la aliaj nevortkernigaj afiksoj per sia pozicio kaj funkcio⁴⁷. Same kiel Rokicki mi dividas la restantajn morfemojn en radikojn kaj afiksoidojn, tamen laŭ alia distinga trajto: En la vortkernigaj ligeblaj nememstaraj reliefiĝas grupo da morfemoj, kiuj povas kondukti en kombino kun

apero de la verbo *ĉui* (*ĉu* laŭ Rokicki estas neligeblaj).

44 Sed eble ĉi tiu fenomeno (se ĝi ekzistas) estas fonetika manifestiĝo de la foresto de junto, kiu estas trajto de la afiksoidoj (vd. sube).

45 Parenteze, krom la originalaj adverboj kaj la senfinaĵaj funkcivortoj ankaŭ fremdaj propraj nomoj apartenas al la memstaraj morfemoj; la debato pri la esperantigo de fremdaj nomoj do estas demando, ĉu konfiksigi (vd. ĉefine de la subĉapitro) memstaran substantivon.


46 Atentu, ke ankaŭ *i* apartenas ankaŭ al la fleksiaj finaĵoj, ne nur al la kategoriaj; kiel en fleksiaj lingvoj, la verbaj finaĵoj per sia ĉeesto montras la vortspecon, dum substantivojn, adjektivojn kaj adverbojn markas nevariaj sufiksoj kun vortfarada signifo. Ĉi-lastaj krom la markadon de la vorto-speco ne havas gramatikan signifon, ĉar ekz. en *knabo* ne *o* signas la nominativon kaj la singularon (kontraŭ PAG: 372 k.m.a), sed ĝuste la foresto de *-j* kaj *-n* (depende de la gramatika teorio oni povus paroli pri nula afikso).

Estas mirige, sed tamen nekontesteble, ke la kategoriaj finaĵoj povas esti kerno en kompleksa vorto (ekt. en *perlabori*), sed ne en simpla vorto (**ao*) – certe pro la regulo (vd. 4), ke du el ili ne rajtas aperi samtempe.

47 Fakte *bo-* (kaj *-ist-*) transirus al la veraj radikoj, se oni ekuzus ekz. **boa*, dum la maloftaj *-ĉj-* kaj *-nj-* estas konataj fandaj esceptoj en la aglutina strukturo de Esperanto, kun pragmatika signifo. Jen malforta flanko de mia rezonado, mi tamen ne povas trovi pli pravigeblan distingon.

aliaj morfemoj de la grupo laŭ du manieroj: Ekz. en *arboaro*, *skriboilo*, *venk-ebleco*, *etburĝo* ili funkcias kiel la plej multaj samklasaj morfemoj (*arbogrupo*, *skribinstrumento* ktp.) kaj estas parafrazeblaj per si mem (*arboaro* = aro da arboj), dum *arbaro*, *skribilo*, *venkebleco* kaj *burĝeto* oni devas pli komplike parafrazi, krome la lasta grupo havas specialan fonologian trajton, nome la foreston de junto inter la morfemoj (kiun oni sekve ne povas marki per la fakultativa interfikso *-o-*). Kvankam ekzemploj kiel *arboaro* estas tre maloftaj (laŭ PMEG: §38.1 ili estas eĉ „eksperimentaj“), precepteblas la baza funkcia diferenco inter la ordinaraĵaj leksikaj morfemoj kaj ĉi tiuj specialaj, kiujn oni nomas afiksoidoj (kp. pri la diferencigo Matos 1987b: 203s., Schubert 1989b: 267, Kiselmann 1991: 102). Montriĝos poste (vd. la tabelon en 4.2), ke la grupon de la afiksoidoj oni devas dividi ankoraŭfoje en du subgrupojn, kaj ke ne ĉiuj el la „klasikaj afiksoidoj“ apartenas al ĝi.

La modifita skemo de Rokicki do aspektas jene:



Skemo 1: La Esperanta morfemaro

Same kiel la afiksoidoj ankaŭ la supre menciitaj sufiksoj vortkategoriaj estas dufunkciaj: Krom la sintaksa funkcio ili havas laŭ ĝenerala konvinko ankaŭ vortfaradan funkcion, nome en la t.n. „malsamelementaj“ vortoj (vd. la sekvan subĉapitron); ili tiam havas propran signifon, tamen tre ĝeneralan (vd. de Saussure 1982: 14, PAG: 376s.): *-o*: „kio estas, ekzistas“, *-a*: „kiu rilatas al“⁴⁸, *-e*: „laŭ maniero de“, *-i* (anstataŭe por ĉiuj verbaj finaĵoj): „fari agon de“ aŭ

48 Kutime oni aldonas „kiu havas kvaliton de“. Tamen mi supozas, ke „rilata“ estas la baza signifo de *-a*, kaj la nocio de kvalito aŭ jam enestas en la radiko (eca karaktero), aŭ estiĝas pro la rilatigo, kiun ĝuste faras la vortospeco adjektivo, do *homa* = „apartenanta al *hom*“ > „apartenanta al la kvalito *hom*“. Oni povas kompari la

„esti en stato de“.

En tiu kunteksto indas preparoli la efektivan staton de tiuj finaĵoj. Krom en la pola versio, §11 FG diras, ke la vortkategoriaj sufiksoj estas rigardataj kiel memstaraj vortoj. Ĉu oni do povas diri *La a o is e!*⁴⁹? Miaopinie ne, kaj tio estas pravigebla per la gramatikaj kompreno kaj terminologio de Zamenhof. Unue estas rimarkinde, ke ĉiam eksplice tekstas, ke ili estas rigardataj kiel memstaraj vortoj, ne, ke ili efektive estas memstaraj vortoj. En la antaŭparolo al la Universala Vortaro Zamenhof (1991: 138) skribas, ke „la vorto «frat'in'o», prezentante unu ideon, estas kunmetita el tri vortoj“, do la kategorisufiksoj staras sub iu aspekto sur la sama ŝtupo kiel la „radikoj“ kaj „afiksoj“. Ĉi tiu aspekto kompreneble estas la vortfarada. La „leksemisma gramatiko“ de Zamenhof (vd. Schubert 1989b: 251-254) el didaktikaj-propagandaj kialoj volis doni al ĉiu morfemo klaran signifon, tiel ke oni povu nur helpe de vortaro abstrakti la signifon de teksto el la morfemkombinoj⁵⁰. Ankoraŭ ne estis la tempo de Ferdinand de Saussure, do Zamenhof parolis pri „vortoj“ por reliefigi la diferencon inter la Esperantaj morfemoj (pli-malpli) unusencaj kaj la semantike-funkcie difuzaj morfemoj funkciaj de la etnolingvoj.

Se la finaĵoj do estas samrangaj kun la radikoj k.a., ili same estas nememstaraj, ĉar ligitaj – nur en la alian direkton. Se oni komparas la difinon de la phe. radikoj kiel konfiksoj (vd. supre 3), oni povus ankaŭ la Esperantajn radikojn tiel klasifiki, dum la vortkategoriaj finaĵoj estas miksa klaso inter vortfaradaj kaj fleksiaj morfemoj.

Ne sufiĉe klaras la loko de la participaj finaĵoj. Ili staras iel meze de fleksia kaj vortfarada morfemo: Ili ja esprimas verban finaĵon en formo de atributo, aliflanke oni ŝajne povas uzi ilin kiel vortkernon⁵¹. Eble oni aldonu ilin al la afiksoidoj.

sensufiksajn bahuvrihiojn, kiuj ja signas eon, kvankam neniu morfemo tion markas (ekz. mha. *ekākṣa-* 'unu-aksa' de *eka-* 'unu' kaj *akṣa-* 'akso'). Ĉi tiun demandon oni devas ankoraŭ pli detale esplori.

49 Pri kelkaj provoj memstare uzi la finaĵojn (precipe de A. Grabowski) vd. Blanke (1981: 36 kun piednoto 18). Ili neniam disvastiĝis.

50 Preskaŭ superfluas citi la faman alineon el la Unua Libro: „Mi aranĝis plenan *dismembriĝon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝangaj* vortoj. Se vi prenos verkon skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per kuniĝo de senŝangaj vortoj.“ (laŭ la represo en Zamenhof 1992b: 234).

51 Ekz. *onta* rezultigas 18 trafojn en la Tekstaro, de kiuj tamen nur tri devenas de tekstoj ekster gazetoj modernaj (*La skandalo pro Jozefo* kaj *Ombro sur interna pejzaĝo*). Entute ne estis trafoj de *osa*, dum *oso* mi trovis

4.1.2 La t.n. radikkaraktero

La radikkaraktero aŭ pli bone morfemklasoj, eltrovo de René de Saussure, kiu bazigis sian teorion pri Esperanta vortfarado sur ĝin, estas apud la *ata/ita*-komplekso unu el la plej akre disputitaj problemoj esperantologiaj. Tamen ja preskaŭ ĉiuj akceptas la kernon de la teorio – ke ekzistas klasoj de morfemoj sendepende de la vortkategoriaj finaĵoj – kaj ĉi ties sekvojn, kaj la disputo temas plejparte pri la terminoj kaj pri la principa demando, ĉu oni deiru de la radikoj al la vortoj aŭ inverse⁵²; por ĝenerala pravigo vd. la superrigardon de la argumentoj ĉe Cherpillod (1996: 7-10).

Sen antaŭsupozoj oni povas resumi la teorion eble sekvamaniere: Ĉiu radiko – tio estas abstraktigo de morfemo *X* el vicoj kiel *X-o*, *X-a*, *X-as* ktp. – havas aron da semantikaj trajtoj. Depende de siaj trajtoj konkreta radiko eniras unu el tri klasoj, kiujn oni povas distingi laŭ la konduto en la vortfarado: Ĉe unu klaso (ni nomu ĝin I) substantivo, kiu esprimas adon, nepre finiĝas je *-ado*, dum substantivo kun eca signifo finiĝas je *-eco*; en alia klaso (II) ada substantivo havas la saman formon, dum la eca finiĝas simple je *-o*; fine ĉe tria klaso (III) la ada substantivo havas simplan *-o*, dum la eca denove havas nemalhaveblan finiĝon *-eco*.

Ne funkcias (t.s. nek klarigas la ĝisnunan uzon nek donas modelojn por vortfarado) iu ajn sistemo, kiu neas tiujn morfemklasojn, ili estas fakto de la lingvo. Kaj kvankam la ofta kritiko kontraŭ la teorio pri radikkaraktero, ke ĝi miksas sintaksan kaj semantikan kategoriojn (kp. Szerdahelyi 1976b: 94, Duc Goninaz 1987: 141s.), ne estas konvinka laŭ la supra formulo kaj ĝenerale (la aktuala lingvoscienco ja akceptas, ke ekzistas iuj rilatoj inter signifo kaj vortospecoj, vd. Glück 2005: 736), ĝi tamen instigas serĉi terminojn aliajn ol tiujn de PAG, kiu parolas pri „substantivaj“, „adjektivaj“ kaj „verbaj radikoj“. Ili respondas al la klasoj I, II resp. III, kaj ja prototipaj substantivoj, adjektivoj resp. verboj troviĝas en la klasoj I, II resp. III (vd. Miner 2005), tiel ke oni prave povus uzi la terminojn de PAG, tamen gravas jena penso: Sendepende de tio, ĉu oni uzas „vortspeco“ aŭ „parto de parolo“ por la distingo inter *o*, *a*, *e* ktp., ne eblas diri „substantiva radiko“ k.s. sen metaforado (~„radiko, kies substantivo estas leksike identa“

unu fojon (en titolo el la jaro 2002, apud *iso* – temas do certe pri speciala efekto).

52 Ekzemple Szerdahelyi (1976b: 99s.) ja klare akceptas la diferencon inter *kombo* kaj *broso*, parolante pri „primara formo“ anstataŭ radikkaraktero. Sed kiel konstatas Schubert (1989b: 256) „Esperanto does not borrow words, but morphemes“, kiujn oni integras en la sistemon per la kategoriaj finaĵoj. Kaj precipe la okazoj, kie Zamenhof donis en la Universala Vortaro vorton kun speciala signifo apud la senfinaĵa radiko (ekz. *doto* sub *dot'*), tute malkredigas la aserton de Szerdahelyi (l.c.: 99), ke la manko de finaĵoj en la UV okazis pro „pure praktika procedo“.

k.s.), ĉar radikoj estas nek vortoj, nek partoj de la parolo. Por ne riski mikson, oni uzu ion alian, mi proponas „aĵa, eca resp. ada klaso“, kio restas en la leksika kampo⁵³.

Kiel atentigas K. Miner (en la diskuto en Miner 2008), ekzistas radikoj, kiuj formas kaj prototipajn substantivon kaj prototipan verbon (ekz. *martel-*). Tiajn vortojn jam atentis Révész (1984) kaj Weidmann (1989: 28s.), kiuj postulas por ili kvaran morfemklason, ili tamen morfologie kondukas kiel aliaj aĵo-klasaj radikoj kaj ne necesigas novan kategorion – tio montras ankaŭ, ke la morfemklasoj estas parte konvenciaj kaj ne plene intuiciaj (kp. ankaŭ la faman ekzemplon de *broso* kaj *kombilo*). Same ne ekzistas propra „adverba radikkaraktero“ (kontraŭ PAG: 375), ĉar ĝi el vortfarada vidpunkto ne estas distingebla de la eca klaso (fakte ja derivitaj adverboj estas adjektivoj transformitaj pro sintaksaj kialoj⁵⁴).

4.1.3 La t.n. vortefikaj reguloj

Ĉi tiu parto de la oficialigita vort-teorio (vd. Akademio de Esperanto 1968: 65s.) koncernas la rilaton inter FE kaj ĈE en kunmetaĵoj, kaj estas la plej problemhava. PAG, plieksplicante la regulojn, distingas tri bazajn regulojn de la t.n. rekta vortefiko (392-408) kaj aldone la t.n. inversan vortefikon (411s., vd. sube). Laŭ ĉi tiu sistemo, kiun ellaboris Kalocsay K., substantiva, adjektiva aŭ adverba ĈE (temas pri vortospeco, ne pri morfemklaso!) substantivigas la FE – tio signifas, ke oni devas parafrazi ĝin per prepozicio + substantivo –, dum verba ĈE adjektivigas aŭ (pli ofte) adverbigas ĝin. Oni jam povas eksupozi, ke temas pri konfuzo inter (kuti-ma) parafrazo kaj vortfarada signifo, kiuj nepre ne identas (kp. Ortner/Ortner 1984: 126s.: la parafrazo enhavas samtempe pli kaj malpli da informoj ol la vortfarada formaĵo)! Tamen ekz. Schubert (1989b: 264s.) akceptas la principojn, sed aldonas kvaran vortefikon – verbigan (ĉe kelkaj afiksoidaj ĈE, ekz. *inda*). Prave skeptika estas jam Blanke (1981: 81s.), komparante la germanan, kie ne ekzistas eĉ ŝpuro de tia regularo kaj atentigante, ke plioftiĝas la tipo adjektivo + substantivo, kiu laŭ la reguloj de vortefiko estas escepto (kp. PAG: 510-512).

La kaŭzo, pro kio la Akademio volis pliprecizigi la rilaton de FE al ĈE estas videbla: Kunmetaĵoj povas havi plurajn interpretojn (ekz. *rapidmezuro*, vd. Blanke l.c.: 82), kio malpliprecizi-

53 Estas iom strange uzi la sufiksoidojn, kiuj estas ĝuste nebezonaj ĉe la membroj de la koncerna klaso (do difini ĝin negative), tamen intuicie tio bone kompreneblas.

54 Kp. PMEG (§28.3, pri formoj kiel **malproksime loĝanto*): „La malĝusta uzo baziĝas sur miskompreno. Oni pensis, ke E-vortoj priskribas agojn, dum A-vortoj priskribas aĵojn. La vera regulo estas, ke E-vortoj priskribas verbojn, dum A-vortoj priskribas O-vortojn.“ – La derivita adverbo en Esperanto do estas sintaksa kategorio, ne semantika.

gas la lingvon. Tamen la reguloj de vortefikoj kaj el lingva kaj el lingvistika vidpunktoj kaŭzas pli da problemoj ol ili helpas rilate la interpreton de kunmetaĵoj:

Ekz. se *-aĵ-* laŭ PAG substantivigus la FE, tiam vortoj kiel *X-a(n)taĵo* signifus „aĵo de X-a(n)to“, do de persono – kio estus *brulantaĵo*? Kial la VER ne validas por la plej esencaj morfemoj *-a* kaj *-i* (kiu estas kompareblaj al radikoj kaj afiksoidoj, vd. supre 4.1.1)?

Kvankam la Lingvaj Respondoj ja ne estas strikte lingvosciencaj traktaĵoj, oni tamen ne rajtas ilin preteratenti; kaj la Respondo pri *-ig-* kun verbaj radikoj (LR: 19s.) klare diras, ke *X-igi* signifas nek *igi X-anta* nek *igi X-ata* (do *igi X-a*, kiel diras PAG), sed *igi X-i*, do verbo restas verbo en kombino kun *igi*, simile oni povas supozi, ke ankaŭ aliklasaj radikoj ne nepre ŝanĝiĝas kun ĝi, kaj fakte oni povas same bone klarigi *X-igi iun* per la parafrazo „igi, ke iu estu X“, do *igi* ne adjektivigas sian flankelementon, sed predikatigas ĝin, kio ĉe substantivoj kaj adjektivoj esprimiĝas per predikativo⁵⁵ (same Mattos 1987b: 2002).

Pro la malĝusta analizo fare de PAG (formaĵoj kiel transformitaj sintagmoj) ĝi devas malakcepti ankaŭ facilan analizon de *fiŝkapti* kaj *leterskribi* (414: „agi leterskribe“), sed ĉe ili temas simple pri precizigaj, do determinaj kunmetaĵoj (*leterskribi* = skribi el la vidpunkto *letero*), kie la FE havas ĝeneralspecan signifon (kp. la ekzemplon *aŭtovendisto* supre, 3.2.1), kaj alie ol *kapti fiŝon*⁵⁶ kaj *skribi leteron* la rezultaj vortoj estas netelikaj kaj netransitivaj.

Kiel PAG mem konstatas (419), prepozicioj, kiuj havas almovan signifon, neniam aperas en la alativa formo *-en*, ekz. *subiri* = iri suben. La fakto, ke adverboj (kaj primitivaj, kaj derivitaj) almenaŭ parte ja konservas ĉi tiun finaĵon (vd. supre 4) klare supozigas, ke la FE en vortoj kiel *subiri* estas ja prepozicioj (kie la almovan signifon montras la regata substantivo, ne la prepozicio mem) kaj ne adverboj (laŭ la vortefika regulo III). Ankaŭ ĉi tie temas pri determinaj kunmetaĵoj, ekz. *subiri* = „iri el la vidpunkto *sub*“, *kunludi* = „ludi el la vidpunkto *kun*“.

Ĉe la t.n. prefiksitaj radikoj kaj prepozicioj (PAG: 510-517) temas ĝuste pri determinaj kunmetaĵoj, kiuj tamen ne relative (esprimeble per prepozicio), sed kvalite (esprimende per kvalita adjektivo) priskribas la ĉefelementon, ekz. *etburĝo* = eta burĝo, *dikfingro*, *duonhoro*, *fiho*, *antaŭsigno*. Ili kontraŭ la oficiala sistemo entute ne estas esceptoj aŭ kontraŭfundamentaj (same PMEG: §37.3, troviĝas krome ekzemploj en la Fundamento mem), se oni nur malak-

55 Tio ne signifas, ke radiko de difinita klaso devas en la parafrazo aperi en la respektiva vortspeco, ekz. *ŝtatigi* ne signifas *igi ŝtato*, sed *igi ŝtata*, same *marteligi* signifas *igi marteli* – bazo de estas vorto, ne morfemo. Alternative oni povus almenaŭ por la verboj difini specialan funkcion, nome pliigo de la valento je unu aktanto (vd. ĝenerale Weidmann 1989).

56 Iomete alia analizo troviĝas en PMEG (§37.4).

ceptas la dogmojn pri vortfarado de PAG.

Precipe senutila estas la t.n. „inversa vortefiko“ (PAG: 411s.): en *senforta* k.s. ne *sen* substantivigas la postan *fort-*, sed simple la bazo estas la vortgrupo *sen forto*, kie *forto* jam devis esti substantivo antaŭ ol ĝi povis kombiniĝi kun la prepozicio; PAG miksas kaŭzon kaj efikon. Parenteze, estas ankaŭ dubinde, ĉu oni bezonas nocion kiel „pluraliga vortefiko rekta“ (l.c.: 412) por la banala konstato, ke semantike la FE en *homamaso* estas plurala.

Resumi ĉion oni povas per jena citaĵo: „Mi konkludas do, ke la ME [morfemefiko – C.B.] ne ĝuste priskribas la efektivan lingvon; kaj la kazoj, en kiuj ĝi funkcias, trakteblas alimaniere [...]“ (Miner 2006: 6.0). Anstataŭ apriorie fiksi la vortfaradan signifon de formaĵoj, oni kiel en ĉiuj aliaj lingvoj allasu iom da polisemio (kaj sekve malklareco) kaj serĉu regulaĵojn en la efektiva lingvouzo (vd. la sekvan ĉapitron).

4.2 Alternativa klasifiko

Ni vidas, ke el la sistemo oficialigita de la Akademio de Esperanto en en 1967 restas nur la tri bazaj semantikaj morfemklasoj, dum stariĝis alia sistemo de la morfemtipoj el vortfarada vidpunkto, enhavanta sep tipojn (neligeblaj, ligeblaj memstaraj, radikaj, afiksoidaj, afiksaj, kategori-finaĵaj kaj fleksi-finaĵaj), kaj foriĝis la vortefikaj reguloj. Ĉar per tio nuliĝis ankaŭ la ĝisnunaj bazoj por la formado de kompleksaj vortoj, en ĉi tiu ĉapitro mi devas unue trovi novan klasifikon, kiu same aŭ pli bone klarigas la modelojn de la Esperanta vortfarado, antaŭ ol oni povas kompari Esperanton kun la hindeŭropaj lingvoj.

Gravas eltrovi, kiuj estas la morfologiaj procezoj, kiuj estigis vortfaradan formaĵon (vd. ĉapitron 2) ankaŭ – kaj precipe – en Esperanto, kie la flekseblo kaj preskaŭ senlima kombineblo de la morfemoj tamen povas tion malfaciligi en multaj okazoj – tio ne signifas, ke oni ne povus analizi iun ekzemplon, sed male, ke oni havas elekton inter kelkaj eblaj analizoj, kiuj ĉiuj kontentige klarigas la signifon: Ĉu ekz. *voĉdoni* estas analizenda kiel determina kunmetaĵo kiel *leterskribi* (vd. supre 4.1.3) aŭ ĉu ĝi estas verbigo de *voĉdono*? Ĉu ĉi tiu *voĉdono* estas kutima kunmetaĵo, aŭ substantivigo de la predikato *doni sian voĉon*? Ĉu *helblua* estas kunmetaĵo de *hela* kaj *blua* aŭ adjektivigo de la sintagmo *hela bluo*? Ne ekzistas kriterio decidi, ĉu unua ekzistis la kokino aŭ la ovo, kaj la koncernaj formaĵoj do estas plurfoje motivitaj.

Ripetante la diversajn morfologiajn procezojn vortfaradajn, oni en Esperanto renkontas la konsiderindan problemon, ke unu el la bazaj difinoj por kunmetaĵoj, nome ke temas pri la kombino de memstaraj vortoj, ne estas bone aplikebla al la lingvo, ĉar en ĝi ĉiuj vortoj, kiujn

oni trovas en vortfaradaj formaĵoj, pro la produktivega vortfarado de Esperanto estas penseblaj ankaŭ kiel memstaraj, eĉ se oni ne povas ilin trovi en tia uzo en la korpuso. Pro tio oni do devas vole-nevole klasifiki la NVS kutime kiel kunmetaĵojn, dum en la germana ili estas ofte certe derivaĵoj (vd. supre 3.2.2; same Blanke 1981: 62).

Cherpillod (1996: 34-40) donas katalogon de pli ol 30 diversaj „kunmetoj“, orditan laŭ morfemklaso kaj vortospeco de la ĈE. Se oni flankenlasas por propra analizo (vd. sube, tabelo 1) unue tiujn formaĵojn, kiuj enhavas la t.n. afiksojn, do tiujn morfemojn, kiuj laŭ la ĝenerala percepto ludas specialan rolon en la vortformado (kp. Wennergren 2008a: §37, §38), kaj se oni ankaŭ malpli atentigas la vortospecon de la ĈE, restas ĉe la radikoj nur tri tipoj:

a) Ĉe adjektivoj kaj numeraloj oni trovas kunmetaĵojn, kiuj konsistas el la kombino de du aŭ pli samrangaj elementoj. Ekz. *nigra-blanka* (rilate al entoj, kiuj estas kaj nigraj kaj blankaj), *dek tri* (rilate al dek + tri entoj).

b) Multe pli ofte oni trovas kunmetaĵojn, ĉe kiuj la FE determinas la ĈE, ekz. *letterskribi* (skribi el la vidpunkto *letero*), *kuirarto* (arto kuira/rilate kuiradon). En multaj okazoj oni povas pliprecizigi la specon de la determino: En subtipo 1 (ofta) la FE esprimas rilaton, ekz. *homgrupo* (grupo da homoj), *amplena* (plena de amo). La FE antaŭ substantiva ĈE povas esti ĉia ajn vort(grup)o, same ĉe adjektivoj kaj verboj (krom numeraloj, kiuj ja nepre estas epitetoj de substantivoj), kp. Blanke (1981: 72s., 95, 104-107). En subtipo 2 (malpli ofta) la FE, ĉiam ekleksa, se la ĈE estas substantivo⁵⁷, esprimas kvaliton de la ĈE, ekz. *ununombro* (nombro, kiu estas unu), *ĉielblua* (blua kiel la ĉielo).

c) La tria tipo ne estas kunmetaĵoj, sed derivaĵoj. En ĝi la vortkategoriaj finaĵoj aliĝas al plur-elementa bazo (kiu povas esti ĉio ajn), ekz. *subtaso* ([*sub taso*]-o⁵⁸), *senutila* ([*sen utilo*]-a), *sanktolei* ([*sankta oleo*]-i). Esence tiaj vortoj do ne estas aliaj ol simplaj vortoj kiel *domo*, *dono*, *bela*, *vira*, *kuri*, *homi* ktp.; la finaĵo estas la ĈE⁵⁹. La karaktero de la kompleksaj formaĵoj laŭ PAG (412s.) dependas de la sintaksa funkcio de la bazo, sed ĉu vere *sub taso* estas malpli kvalifika ol *sen utilo*? Miaopinie la karaktero dependas nur de la vortkategoria finaĵo, kiun oni

57 La sola escepto estas geografiaj nomoj kiel *Nordameriko* (same *sud-*, *orient-*, *okcident-*, *mez-*).

58 *Subtaso* ne estas *suba taso, sed aĵo sub la taso. Plurformante la vorton oni devas laŭ la principo de sufiĉo konservi la informon, ke temas pri aĵo, do ekz. *subtasaĵa* = rilata al subtaso.

59 Ĉar la kategorisufiksoj estas ĉefelementoj en la t.n. malsamelementaj vortoj, ili estas tio tre verŝajne ankaŭ en la t.n. samelementaj vortoj, kvankam semantike ili estas superflujaj. Pro simpleco oni tamen povas opinii tiajn vortojn simplaj.

elektis laŭ la esprimbezono (do laŭ la vortfarada sfero). Per lingva konvencio ĝeneraliĝis kutime unu interpreto de tiaj formaĵoj, alie oni ne povus klarigi, kial la strukture identaj *subtaso* kaj *senutilo* (serĉo per Google rezultigis 539 trafojn de *senutilo*, kaj 534 de *senutileco*) esprimas jen aĵon, jen econ⁶⁰. Specialaĵo de ĉi-lastaj tipo estas, ke ĉe la FE povas resti la kategoriaj finaĵoj de la baza sintagmo – sed ne la finaĵoj (*sin-*, ekz. en *sinmortiga*, havas alian signifon) –, ekz. *dubasenca* ([*duba senco*]-*a*), dum en veraj kunmetaĵoj (tipo b) aperas nur *-o-* kiel ligvokalo (vd. supre 4).

Pli komplika estas la „afiksa komplekso“, t.e. tiuj morfemoj, kiuj plej ofte aperas en vortfaradaj formaĵoj. Ne nur pro tio ili ricevas specialan lokon en la instruo de la lingvo, parte ili en vortfaradaj formaĵoj ankaŭ kondukas alie ol kiel bazo de simpla vorto de la tipo *domo*. Krome vortoj kun ili multe pli facile leksikeriĝas – komparu *tranĉilo*, *homaro* kun *tranĉinstrumento*, *homgrupo*⁶¹. Interesa trajto de ili estas, ke ili fonetike plene integriĝas kun la aliaj morfemoj, t.s. ne ekzistas junto inter stamo kaj afiks(oid)o, kiel atentigas multaj esperantologoj, ekz. Lindstedt (1982/83, tria parto); ili do ĉiuokaze estas grupo, kiun oni traktu aparte de la aliaj vortfaradaj formaĵoj. Ĉe la „afiksoj“ ne aŭ preskaŭ ne aldoniĝas novaj elementoj (la lasta estis *-end-* en 1953). Lastpozicia, sed grava estas la konstato, ke afiksoidoj estigas determinajn formaĵojn kun kvalita FE pli ofte ol kutimaj radikoj – ĉe ĉi-lastaj la FE devas aparteni al la eca morfemklaso (ekz. en *altforno*), dum ekz. *ul* donas al ĉiuj siaj FE kvalitan karakteron (ekz. en *homulo*)⁶².

Por detala priskribo de la unuopaj morfemoj vd. Wennergren (l.c.). Mi grupigas ilin en kvar kategoriojn, dum tradicie oni parolis ĝis nun nur pri tri: afiksoj, afiksoidoj kaj radikoj. Afiksoj, ekz. *-ĉj-*, entute ne aperas kiel bazo de vorto, dum radikoj, ekz. *-em-*, funkcias kiel ĉiu alia ordinara leksika morfemo laŭ la reguloj de kunmetado (vd. supre). Ĉe ili ekzistas du distingebaj kategorioj de afiksoidoj. Principe ili povas roli kiel bazo de simpla vorto samkiel radikoj, tamen por ili validas specialaj reguloj: Tipo 1, ekz. *mal*, en vortfaradaj formaĵoj funkcias kiel

60 *Sen-X-o* ĉiam estas [[*sen X-o*]-*a*]-*o*, ne *[*sen X-o*]-*o* aŭ **sena X-o*, sed ekz. *antaŭ-X-o* povas esti ambaŭ, eĉ al-done [*antaŭ-X-i*]-*o*, ekz. *antaŭtagmezo*, *antaŭbrako*, *antaŭpreparo*.

61 Tio signifas, ke ilia signifo ne estas deduktebla el la vortfarada signifo, kp. Blanke (1981: 32). Kiel atentigas Lindstedt (1982/83, tria parto) tamen tiu regulo ne estas absoluta, ĉar ekz. *lavmaŝino* estas leksemo kun tre speciala signifo, sed ne *lavilo*. Estus esplorinde, ĉu la leksikeriĝintaj afiks(oid)aj formaĵoj estas relative prototipaj, kio estas bone komprenebla ekz. ĉe *tranĉilo* kaj *preĝejo* en la senco *kirko*. Malan okazon oni vidas en la kunigo de la esprimo *dika homo* al *dikulo*, dum **dikhomo* ne estas ebla, ĉar ne ekzistas tia nocio.

62 Alia interesaĵo estas, ke ili evoluis inverse la afiksoidoj de la etnolingvoj: de neliberaj al liberaj elementoj.

afikso, ne kiel kunmetada elemento. La sufiksoidoj *-aĉ-*, *-eg-* kaj *-et-* havas kiel prefiksoidoj la saman signifon (vd. Blanke 1981: 80), ilia loko verŝajne ŝuldiĝas al etnolingva influo (ekz. *floreto* anstataŭ *etfloro* laŭ ekz. fra. *fleurette*). Tipa 2 funkcias principe kiel kunmetada konstituento, tamen laŭ iom pli specialaj reguloj – ekz. *dis-* kaj *re-* kombiniĝas nur kun verboj, tiel ke oni eĉ povas ellasi en vortoj kiel *reformo* la sufiksoidon *-ad-* (vd. PMEG: §37.5) – aŭ/kaj kun pli speciala signifo, ekz. *-ism-* en la senco „lingva apartenaĵo“ – simplan metaforadon oni tamen povas flankenlasi, ekz. ĉe *eks-* en la senco „kastrita“.

Kiel jam estis dirite (kp. supre 4.1.1 pri *arboaro* k.s.), la afiksoidaj morfemoj havas duoblan karakteron: Ili povas roli kiel afiksoidoj, sed ankaŭ kiel ordinaraj radikoj. Pro tio en formaĵoj, kiuj konsistas nur el afiks(oid)oj oni ne scias, ĉu temas pri afiksoida, ĉu pri radika uzado, sed kp. ankaŭ *malvorto* – ĉu „malo de vorto“ aŭ „vorto kun prefikso *mal-*“?

Same kiel ĉe plurelementaj kunmetaĵoj ankaŭ ĉe formaĵoj kun pluraj afiks(oid)oj ne ekzistas morfologiaj signoj por la ĝusta analiza laŭ senperaj konstituentoj. Por elpensi ekstreman ekzemplon, ĉu *fi-* en *fijunulargastejestrinado* rilatas al iuj junuloj, la tuta junularo, la junulargastejo, la estrino aŭ al ĉi ties ido?

Sekvas tabela superrigardo pri la morfemoj, eble la kategoriigo en unuopaj okazoj estas diskutinda. Ne enestas en la tabelo la morfemo *edz-*, kiu origine estis afiksoido, sed jam de longe estas uzata plej ofte kiel radiko (vd. PAG: 435).

	<i>bo</i>	<i>ĉef</i>	<i>dis</i>	<i>ek</i>	<i>eks</i>	<i>ge</i>	<i>mal</i>	<i>mis</i>	<i>pra</i>	<i>re</i>	<i>vir</i>	<i>aĉ</i>	<i>ad</i>	<i>aĵ</i>	<i>an</i>	<i>ar</i>	<i>ĉj</i>	<i>ebl</i>	<i>ec</i>	<i>eg</i>	<i>ej</i>	
afikso	x ⁶³																x					
afiksoido 1						x	x ⁶⁴					x									x	
afiksoido 2		x ⁶⁵	x	x					x	x	x		x	x	x ⁶⁶			x				

63 Teorie *bo-* povus esti radiko de propra vorto, tamen krom la vortoj *boa* kaj *boeco*, ripetitaj laŭ PAG (504, sen fontindiko), mi ne povis trovi memstaran uzadon en la Interreto, en la tekstaro troviĝas nur unufoje *boeco* (en „Vivo vokas“ de S. Engholm, 1946), kio miaopinie ankoraŭ ne pravigas klasifikon kiel radikon.

64 *Mal-* memorigas la marĝenan tipon de ger. *Beinahe-Katastrophe* 'katastrofo, kiun oni preskaŭ ne povis preventi' („preskaŭ-katastrofo“, kp. Ortner/Ortner 1983: 36), kiu estas escepta, ĉar ĉe ĝi ne funkcias la plej baza parafrazo „AB estas B“. Oni povus pensi pri formo de metaforado; ĉiuokaze per tio oni povus ankaŭ pravigi klasifikon de *mal'* (eca radiko) kiel duagrada afiksoido.

Parenteze, sensencaĵo de PAG (506) estas la kritiko, ke *mal-* ofte rompas la akcentregulon: Kontrastiga akcento estas propraĵo de ĉiu lingvoj, kiun ankaŭ Esperanto ne povas malhavi.

65 *Ĉefo* ja montras personon, tamen la signifero {persono} jam foriĝas en la adjektivo *ĉefa*, kiun oni povas rigardi kiel bazon de la flankelementa *ĉef-*. Ĝi formas karmadarajojn, do *ĉefredaktoro* = *ĉefa redaktoro*. *Ĉef-* do eble ne apartenas al la afiksoida sistemo de la lingvo, ankaŭ ĉar ĝi ne estas sinonimo al iu internacia vorto (kiel ekz. *-em-*, kiu tamen ne montras vortfaradajn specialaĵojn).

radiko					x			x							x			x		x	
	<i>em</i>	<i>end</i>	<i>er</i>	<i>estr</i>	<i>et</i>	<i>id</i>	<i>ig</i>	<i>iĝ</i>	<i>il</i>	<i>in</i>	<i>ind</i>	<i>ing</i>	<i>ism</i>	<i>ist</i>	<i>nj</i>	<i>obl</i>	<i>on</i>	<i>op</i>	<i>uj</i>	<i>ul</i>	<i>um</i>
afikso															x						
afiksoido 1					x																x
afiksoido 2		x					x	x	x	x ⁶⁷	x		x						x	x	
radiko	x ⁶⁸		x	x		x						x		x ⁶⁹		x ⁷⁰	x	x			

Tabelo 1: Vortfarada karaktero de la t.n. afiksoj

La sistemo de PAG eble faras pli koheran kaj unuecan impreson, tamen ĉi tiu nova klasifiko, sintezita el kritikoj de la oficialigita sistemo, pli konvene priskribas la efektivan lingvon, kio havu prioritaton ankaŭ en planlingvo.

Montriĝis, ke en Esperanto ekzistas du vortfaradaj procezoj, kiu estas senlime produktivaj ĉe ĉiuj radikoj, la determina kunmetado kaj la transpono per vortkategoriaj finaĵoj: Ĉiu ajn ligebla elemento (aŭ pluraj) povas kombiniĝi kun ĉiu ajn radiko resp. kategori-sufikso. Limigon al vortospeco havas la kombinaj kunmetaĵoj (numeraloj kaj adjektivoj), fine limigon al unuopaj morfemoj oni trovas ĉe la fermita klaso de la afiksoj kaj afiksoidoj – tio tamen ne signifas, ke ili ne estus produktivaj, eĉ male (pri neproduktivaj tipoj en Esperanto vd. supre 4).

Kompreneble oni povus ankoraŭ diri multon pri la diversaj apartenaĵoj de la t.n. afiksoj, sed tio ne estas la tasko de ĉi tiu laboraĵo.

66 An en multaj vortoj funkcias kiel ordinara radiko, tamen en sia libera formo ĝi ne havas la signifon 'loĝanto'.

67 Oni povus pensi pri du paronimaj morfemoj *-in-* (tiel Blanke 1981: 29, 66): *instruistino* = *instruista ino*, sed *vir-ino* ≠ *vira ino*. Tamen restas la eblo de unueca radiko, kiam oni komparas similan karmadarajon en la luvia: *nānasri-* 'fratino', el *nāna-* 'frato' kaj *asri-* 'virino', do „virino, kiu estas kiel frato“ (kun metaforo), vd. Starke (1998: 481a, piednoto 184).

La konstato de Wennergren (PMEG: §38.2.20) „Oni do ne uzas vortojn kiel **belino**, **virgino** k.s., ĉar *belo* kaj *virgo* estas ecoj, kaj ecoj ne povas havi sekson. Oni devas unue krei la vortojn *belulo* kaj *virgulo*, kiuj montras ion, kio povas havi sekson.“ mi opinias malĝusta, ĉar *ino* jam signifas 'individuo (de la „idnaska sekso“, vd. PIV: 468)', do *-ul-* en *belulino* donas nur la informon, ke temas pri homo, ne pri besto, kaj en konvena kunteksto povas esti superflua.

68 Laŭ PMEG (§38.2.11) la „radiko antaŭ EM normale ricevas agan signifon“, tamen mi ne povas vidi sencan diferencon ekz. inter *manĝema*, *dogmema* kaj *manĝoinklina*, *dogmoinklina*.

69 Estas iom mirige, sed *-ist-* tute ne aperas kiel bazo de vorto, kvankam oni povus doni al **isto* klaran signifon, ĝi tiuokaze povus eĉ funkcii en siaj formaĵoj kiel ordinara radiko (formante determinajn kunmetaĵojn). Pro ĝia neafiksa konduto en la vortfarado oni devas klasigi ĝin kiel radikon (kontraŭ Blanke 1981: 29), vd. ĉ. 5.

70 Pri la klasigo de la nombraj „sufiksoj“ vd. Malovec (1999: §4.17) kontraŭ PAG (409).

5. Provo apliki la nociojn laŭ 3.2 al Esperanto

Nur nun ni povas reiri al la propra celo de ĉi tiu esploro, al la demando, ĉu la Esperanta vortfarado estas priskribebbla per la rimedoj de la klasika lingvoscienco.

Freŝe havante en la menso la konstatojn de la antaŭa ĉapitro kaj rememorante la ĉapitron 3.2, ni povas kompari la unuopajn modelojn vortfaradajn:

La tipo a (ekz. *nigra-blanka*) konformas al la adjektivaj dvandvoj de la modernaj hindeŭropaj lingvoj. Por la substantivaj dvandvoj de la malnovaj ne ekzistas Esperanta respondaĵo.

La tipo b (ekz. *kuirarto*) kompreneble estas determinaj kunmetaĵoj, kaj ties subtipoj tatpuruŝo kaj karmadarajo videble respondas al Esperantaj subtipoj (ekz. *homgrupo* resp. *ĉielblua*). En la planlingvo tamen la tipo laste menciita estas limigita ĉe substantivaj ĈE al la kombino kun adjektivaj FE, dum ekz. en la germana ĝi povas esti ankaŭ substantivo (ekz. *Kunstwerk*). Escepto estas kelkaj afiksoidoj, kiuj allasas nur karmadarajan interpreton, nome *-aĵ-*, *-ul-*, *-in-*.

La tipo c (ekz. *senutila*) estas kunmetaj derivaĵoj. La Esperantaj formoj distingiĝas de la hindeŭropaj per tio, ke ili ĉiam estas eksplicaj, dum precipe en la malnovaj he. lingvoj oni trovas ankaŭ konvertojn kaj implicajn derivaĵojn. Dum en ili oni pli detale distingas NVS, KPR, hipostazojn kaj bahuvrihiojn, tia disdivido ne havas sencon en Esperanto, ĉar ne temas en ĝi pri distingeblaj procezoj (vd. sube pri la KPR), sed nur pri unu, kiu esence identas al la formado de la t.n. sam- kaj malsamelementaj vortoj per vortkategoriaj finaĵoj. Kiel ĝeneralan terminon por Esperanto mi proponas uzi hipostazo (en iom pli vasta senco).

De ĉi-lastata modelo oni devas distingi la eksplican afiksan derivadon, kiun en Esperanto reprezentas nur malmultaj morfemoj (ekz. *-ĉj-* kaj la afiksoidoj de la tipo 1, ekz. *-aĉ-*): Ili modifante aliĝas al preta vorto kaj ne povas kunigi plurajn en novan (dum ekz. la adjekton *en la venonta semajno* oni povas hipostazigi al *venontsemajne*)⁷¹.

Tiuj morfemoj kune kun la kunmetadaj morfemoj de la dua tipo de afiksoidoj (ekz. *-an-*) kaj aro da radikoj (ekz. *-id-*) formas specialan grupon (vd. supre), kiun oni povus nomi provizore vortformiloj. La partojn, sed ne la tuton, oni povas nomi per la terminoj de la neesperanta lingvoscienco. Temas do pri Esperanta apartenaĵo, kvankam oni ja ne forgesu, ke la afiksoidoj ankaŭ en aliaj lingvoj estas precipe komplika kaj nekohera kampo inter derivado kaj kunmetado (vd. supre 3.2).

Oni povus pli detale kontrastigi la funkcion de unuopaj vortformiloj kun la he. terminoj por derivaj kategorioj, ekz. *-il-* formas instrument-substantivojn, *-ad-* agad-substantivojn, *-aĵ-* ag-

⁷¹ Jen la kaŭzo, kial *-ist-* apartenas al la radikoj: FE antaŭ ĝi povas esti „disfala“.

aĵ-substantivojn, *-ul-*, *-ant-*, *-ist-* agant-substantivojn ktp., sed tio jam apartenas al detala semantika priskribo, kiu nenion rezultigas rilate la komparon de la Esperanta kaj hindeŭropaj sistemoj.

Uzante la klasifikkriteriojn de la he. tipoj (vd. supre 3.2), oni povas konstati, ke ĉiuj vortfaradaj formaĵoj en Esperanto estas alfindeterminaj kaj finrekciaj. Tio validas ankaŭ por la ŝajne esceptaj Esperantaj respondaĵoj por la he. „kunmetaĵoj“ de prepozicia rekcio (ekz. lat. *inter-annus* 'interivera', vd. 3.2.2), ĉar en la planlingvo la kapo estas la vortkategoria finaĵo (kiu havas pli altan vortfaradan rangon ol la latina sufikso, vd. 4.1.1), ne la prepozicio.

Kiel jam dirite (vd. supre 3.2.3), mi ne opinias dunominalojn kiel *membro-abonanto* kaj amre-ditojn kiel *fojfoje* vortfaradaj formaĵoj. Kunigaĵojn oni trovas malofte, ekz. *disde*, *ekde*⁷².

72 Oni povus opinii la formaĵon de la tipo *pagipova* kunigaĵoj (*pagi pova*, kp. Mattos 1987b: 191), sed prefere temas pri hipostazoj (*pagi povi*)-a, kie la kutima sinsekvo (*povi pagi*) ŝanĝiĝis laŭ la ĝenerala skemo de vortfina kapo.

6. Konkludoj

Esperanto estas aŭtonoma lingvo, ankaŭ (kaj precipe) en la kampo de vortfarado. Ĉi tiu banala konstato estas sufiĉe grava, se oni konsideras la oftan kritikon, ke la internacia lingvo sekvas (hind)eŭropajn, precipe latinidajn modelojn ankaŭ ekster la vortprovizo. Ke tio ne ĝustas, oni jam montris (kp. Piron 1980, Wells 1989).

Rilate la vortfaradon mi post ĉi tiu esploro povas konfirmi, ke jes ja oni povas priskribi Esperanton uzante terminojn, kiujn konas ĉiuj lingvistoj-neesperantistoj, sed oni ne bezonas ĉiujn kaj oni ne povas uzi ĉiujn en ĝuste la sama maniero.

Esperanto disponas pri malgranda aro da vortfaradaj modeloj, kiuj tamen permesas senfinan formadon de novaj vortoj motivitaj. La modeloj estas sufiĉe bazaj: determina kaj kombina kunmetadoj, hipostazigo, eksplica derivado, kiuj funkcias laŭ unuecaj principoj (fina rekcio kaj alfina determino). Mankas komplikaj kiel ekz. la t.n. „*ént^heos*-kunmetaĵoj“, tamen ja ankaŭ en Esperanto povas aperi malklaraj okazoj (kp. la ekzempon en piednoto 59).

Speciala komplekso estas la vortformiloj, por kio mankas klasikaj nocio kaj termino. Estas interesa demando por estontaj esploro, ĉu la kvardeko da morfemo, kiujn oni tiel kunigas, vere estas difinebla kiel tutaĵo disde aliaj morfemoj, aŭ ĉu temas prefere pri listo de malsamaĵoj – oni ja ĉiuokaze devas distingi kvar tipojn, vd. supre 4.2 –, kiu estas nur utila por la lernado de la lingvo, sen alia bazo lingvistike pravigebla. Nur poste oni scios, ĉu eblas senhezite skribi – aŭ ĝuste ne skribi – gramatikon de Esperanto, kiu klarigas la vortfaradon al la neesperantistaj lingvistoj en lingvaĵo, kiun ili komprenas⁷³.

[Noto (2008-11-24): Fakte mi estis tro hezitema: Ĉe ĉiu el la kvar tipoj de „afiksoidoj“ videblas la duobla karaktero laŭ ĉe- aŭ foresto de junto, ili formas do apartenan komplekson; ĉi tion tamen integri eblas en laŭtradician prezenton de la vortfarado]

73 Plia klarigenda demando estas, ĉu la priskribon de la vortfarado oni bazigu sur la vorto aŭ sur la radiko. Mi apriore prenis radikbazitan aliron, tamen eble vortbazita laŭ mia nuna kompreno povus esti pli fruktodona.

Bibliografio⁷⁴

- Akademio de Esperanto (eld.). 1968. *Aktoj de la Akademio. 1963-1967*. Rotterdam: Zwager (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto 9).
- Atanasov, Atanas D. 1983a. *La lingva esenco de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- . 1983b. „La vortfarado en Esperanto“. En: Atanasov 1983a, 15-27 (represo de artikolo en *Nuntempa Bulgario* 1969/10, 1ss.).
- Becker, Ulrich (eld.). 1998. *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 7. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 7. - 9. November 1997 in Berlin*. Berlin: GIL.
- Benveniste, Émile. 1967. „Fondements syntaxiques de la composition nominale“. *BSL* 62, 15-31.
- Blanke, Detlev. 1981. *Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung*. Berlin: Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft (Linguistische Studien, Reihe A, Nr. 85).
- . 1985. „Konfronta komparo de Esperanto kaj la germana lingvo“. En: Oljanov 1985, 87-90.
- Booij, Gert k.a. (eld.). 2000. *Morphologie. Morphology. Ein internationales Handbuch zur Flexion und Wortbildung. An international handbook on inflection and word-formation*. 1. Halbband. Volume 1. Berlin – New York: de Gruyter (HSK 17.1).
- Brogyanyi Bela (Hg.). 1979. *Studies in Diachronic, Synchronic, and Typological Linguistics. Festschrift for Oswald Szemerényi on the Occasion of his 65th Birthday*. Parto I kaj II. Amsterdam: Benjamins (Amsterdam Studies in the Theory and History of Linguistic Science. Series IV – Current Issues in Linguistic Theory. Vol. 11).
- Brosch, Cyril. 2008. *Nominalkomposita und kompositionsähnliche Strukturen im appellativen Wortschatz des Hethitischen*. Nepublikigita magistra laboraĵo. Berlin.
- Brugmann, Karl. 1900. „Über das Wesen der sogenannten Wortzusammensetzung“. *Berichte über die Verhandlungen der königlich sächsischen Gesellschaft der Wissenschaften zu Leipzig, Philologisch-historische Classe, 52. Band*, 359-401 (citita kiel Brugmann 1981 laŭ la represo en Lipka/Günther 1981, 135-178).
- . 1906. *Grundriß der vergleichenden Grammatik der indogermanischen Sprachen. Vergleichende Laut-, Stammbildungs- und Flexionslehre nebst Lehre vom Gebrauch der Wortformen der indogermanischen Sprachen. Zweite Bearbeitung*. Band II: *Lehre von den Wortformen und ihrem Gebrauch*. Teil 1: *Allgemeines. Zusammensetzung (Komposita). Nominalstämme*. Straßburg: Trübner.
- Cherpillod, André. 1996. *Vortkonsisto. Vortfarado. Vortanalizo. Vortordo*. Courgenard: Memeldono
- Clackson, James. 2002. „Composition in Indo-European Languages“. *TPhS* 100, 163-167.

74 Mi volas esprimi sinceran dankon al Detlev BLANKE (Berlino), kiu per la disponigo de multa nemalhavebla literaturo entute ebligis al mi ĉi tiun laboraĵon.

- /Birgit A. Olsen. (eld.). 2004. *Indo-European Word Formation. Proceedings of the Conference held at the University of Copenhagen October 20th - 22nd 2000*. Copenhagen: Museum Tusulanum Press.
- Crespo, Emilio/José Luis García Ramón (eld.). 1997. *Berthold Delbrück y la sintaxis indoeuropea hoy. Actas del Coloquio de la Indogermanische Gesellschaft Madrid, 21-24 de septiembre de 1994*. Wiesbaden: Reichert.
- Daŝgupto [Dasgupta], Probal. 1987. „Kategorioj, la fleksio, la lingvistiko kaj radikoj en Esperanto“. En: Mattos 1987a, 63-75.
- Delbrück, Berthold. 1900. *Grundriß der vergleichenden Grammatik der indogermanischen Sprachen*. Band V: *Vergleichende Syntax der indogermanischen Sprachen. Dritter Theil*. Straßburg: Trübner.
- Duc Goninaz, Michel. 1987. „Kiel priskribi Esperanton? Problemoj metodologiaj kaj terminologiaj“. En: Regulo Pérez 1987, 141-149.
- Dungert, Dieter. 1998. „Die Bildung von Verben aus substantivischen Wortstämmen im Esperanto“. En: Becker 1998, 52-54.
- Dunkel, George E.. 1981. „Āmreḍita and iteration of preverbs in Vedic and Hittite“. *KZ* 95, 214-231.
- . 1999. „On the origins of nominal composition in Indo-European“. En: Eichner/Luschützky 1999, 47-68.
- Eichholz, Rüdiger (eld.). 1990a. *Akademiaj Studoj 1988-1990*. Bailieboro: esperanto press.
- . 1990b. „Ĉu flanka elemento ne povas esti adjektivo?“. En: Eichholz 1990a, 209-212.
- Eichner, Heiner/Hans Ch. Luschützky (eld.). 1999. *Compositiones indogermanicae in memoriam Jochem Schindler*. Praha: Enigma.
- Etter, Annemarie (eld.). 1986. *o-o-pe-ro-si. Festschrift für Ernst Risch zum 75. Geburtstag*. Berlin – New York: de Gruyter.
- Fabian, Erich. 1931. *Das exozentrische Kompositum im Deutschen*. Leipzig: Hermann Eichblatt (Form und Geist 20).
- Fanselow, Gisbert. 1981. *Zur Syntax und Semantik der Nominalkomposition. Ein Versuch praktischer Anwendung der Montague-Grammatik auf die Wortbildung im Deutschen*. Tübingen: Niemeyer (Linguistische Arbeiten 107).
- Fleischer, Wolfgang/Irmhild Barz. 1992. *Wortbildung der deutschen Gegenwartssprache. Unter Mitarbeit von Marianne Schröder*. Tübingen: Niemeyer.
- Forssman, Bernhard/Robert Plath (eld.). 2000. *Indoarisch, Iranisch und die Indogermanistik. Arbeitstagung der Indogerm. Ges. vom 2. bis 5. Oktober 1997 in Erlangen*. Wiesbaden: Reichert.
- Glück, Helmut (eld.). 2005. *Metzler Lexikon Sprache*. 3a eldono. Stuttgart – Weimar: Metzler.
- Golden, Bernard. 1989. „La kreado, aprobo kaj oficialigo de vortoj en Esperanto“. *Esperanto Aktuell* 1989/8, 23-25.
- Günther, Hartmut. 1981. „N + N: Untersuchungen zur Produktivität eines deutschen Wort-

- bildungstyps“. En: Lipka/Günther 1981, 258-280.
- Humbach, Helmut. 1954. „Kompositum und Parenthese“. *MSS* 5, 90-99.
- Insler, Stanley. 1998. „*mitrāvāruṇā* or *mitrā vāruṇā*?“. En: Jasanoff k.a. 1998, 285-290.
- Jasanoff, Jay k.a. (eld.). 1998. *Mir curad. Studies in Honor of Calvert Watkins*. Innsbruck: Institut für Sprachen und Literaturen der Universität Innsbruck (IBS 92).
- Kalocsay Kálmán/Gaston Waringhien. 1980. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Kvara, tralaborita eldono. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Kiselman, Christer O. 1991. „Vortkreaĵ procezoj de Esperanto“. *Scienca Revuo* 42/2, 95-109.
- Kramer, Günther. 1962. „Zur Abgrenzung von Zusammensetzung und Ableitung. Ein Beitrag zur inhaltsbezogenen Wortlehre“. *PBB* (Halle) 84, 406-438.
- Larsson, Jenny H. 2002. „Nominal Compounds in the Baltic Languages“. *TPhS* 100, 203-231.
- Lévy, Pierre. 1983-1984. „Komparo inter la hindeŭropaj lingvoj kaj Esperanto“ *Monata Cirkulero – Kultura Centro Esperantista* 152, 5-8 (I), 153, 4-9 (II), 154, 4-8 (III), 155, 5-9 (IV), 156, 5-6 (V), 157, 6-12 (VI), 158, 4-7 (VII), 159, 4-7 (VIII).
- Lindner, Thomas. 2003. „Zur Schnittstelle von Komposition und Derivation“. En: Tichy/Wodtke/Irslinger 2003, 103-114.
- Lindstedt, Jouko. 1982/83. „Recenza eseo: Kalman Kalocsay - Gaston Waringhien: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Rotterdam 1980: Universala Esperanto-Asocio“. http://www.helsinki.fi/~jslindst/pag_rec.html (aperis unue en *Planlingvistiko* 1, 10-18; 3, 13-19; 6, 7-14) (2008-06-20).
- Lipka, Leonhard/Hartmut Günther (eld.). 1981. *Wortbildung*. Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft (Wege der Forschung 564).
- Lühr, Rosemarie. 2003. „Wortartwechsel in altindogermanischen Sprachen“. En: Tichy/Wodtke/Irslinger 2003, 115-127.
- Malovec, Miroslav. 1999. *Gramatiko de Esperanto*. Interreta eldono s.l.: <http://mujweb.atlas.cz/Kultura/malovec/gram.htm> (2008-06-20).
- Mattos, Geraldo. 1987a. *Centjara Esperanto. Jubilea libro de Akademianoj*. Chapecó-Sc: Fonto.
- . 1987b. „Vortanalizo en Esperanto“. En: Mattos 1987a, 169-204.
- Meissner, Torsten/Olga Tribulato. 2002. „Nominal Composition in Mycenaean Greek“. *TPhS* 100, 289-330.
- Mikkola, Eino. 1967. *Das Kompositum. Eine vergleichende Studie über die Wortzusammensetzung im Finnischen und in den indogermanischen Sprachen. I. Der Anteil der Komposita an der Sprache des modernen Romans*. Helsinki – Leiden: Suomalainen Kirjakauppa/ Brill.
- Miner, Ken. 2003. *Prova sistema analizo de Esperanta morfologio*. http://www.sunflower.com/~miner/MORFOLOGIO_package/morfologio.html (2008-09-20).
- . 2005. *Croft-modelo por la Esperanta radiko-kategorieco*. http://www.sunflower.com/~miner/CROFT_package/croft.html (2008-09-20).
- . 2006. *La morfemefiko de KALOCSAY-SCHUBERT*. <http://www.sunflower.com/~miner/>

- ME_package/me.html (2008-09-20).
- 2008. „Noto pri esperantaj radikoj“. En: *Lingva Kritiko. Studoj kaj notoj pri la Internacia Lingvo. Esperantologio Interreta*. Interreta revuo: <http://lingvakritiko.com/2008/06/05/noto-pri-esperantaj-radikoj/> (2008-09-20).
- Nagórko, Alicja. 2007. *Zarys gramatyki polskiej*. 7a, kompletigita eldono. Warszawa: Wydaw-nictwo Naukowe PWN.
- Oljanov, Violin (eld.). 1985. *Interlingvistiko. Esperantologio*. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio.
- Olsen, Susan. 2000. „Composition“. En: Booij k.a. 2000, 897-196.
- Ortner, Hanspeter/Lorelies Ortner. 1984. *Zur Theorie und Praxis der Kompositaforschung*. Tübingen: Narr (Forschungsberichte des Instituts für deutsche Sprache 55).
- Ortner, Lorelies k.a. 1991. *Deutsche Wortbildung. Typen und Tendenzen in der Gegenwartssprache. Eine Bestandsaufnahme des Instituts für deutsche Sprache, Forschungsstelle Innsbruck*. Vierter Hauptteil: *Substantivkomposita (Komposita und kompositionsähnliche Strukturen 1)*. Berlin – New York: de Gruyter (Sprache der Gegenwart 79).
- Paul, Hermann. 1903. „Das Wesen der Wortzusammensetzung“. *IF* 14, 251-258 (citita kiel Paul 1981 laŭ la represo en Lipka/Günther 1981, 179-186).
- Piron, Claude. 1980. *Esperanto: eine linguistische Standortbestimmung. Aus dem Esperanto übersetzt von Günther Becker*. Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund e.V. (germana traduko de: la sama. 1977. *Esperanto – ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* Rotterdam: UEA).
- Pollak, Hans W.. 1912a. „Zur exozentrischen Komposition“. *IF* 30, 55-58.
- 1912b. „Zur Einteilung der Komposita“. *IF* 30, 58-64.
- Régulo Pérez, Juan (eld.). 1987. *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. II: Esperantismo*. La Laguna Universidad de la Laguna.
- Reiersöl, Olav/R.C. Marble. 1949-1955. „A Comparison between Word Formation in Esperanto and English“. *Esperantologio* vol. 1, 53-58.
- Révész Sándor. 1984. „Radikkarakteroj kaj elementaj vortstrukturoj“. En: Rokicki 1984a, 103-125.
- Risch, Ernst. 1944/49. „Griechische Determinativkomposita“. *IF* 59, 1-61, 245-294.
- 1974. *Wortbildung der homerischen Sprache. Zweite, völlig überarbeitete Auflage*. Berlin – New York: de Gruyter.
- Rix, Helmut k.a. 2001. *Lexikon der indogermanischen Verben. Die Wurzeln und ihre Primärstamm-bildungen. Zweite, erweiterte und verbesserte Auflage bearbeitet von Martin Kümmel und Helmut Rix*. Wiesbaden: Reichert.
- Rokicki, Ryszard (eld.). 1984a. *Acta Interlinguistica. 11-a scienca interlingvistika simpozio, Varsovio, 9-13.04.1983 J.* Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne.
- 1984b. „Enkonduko en la leksemstrukturan klasifikadon de la esperanta morfemaro“. En: — 1984a, 127-141.
- Sadovski, Velizar. 1998. „Entheos-Komposita und präpositionale Rektionskomposita: Die Theorien über ihren Ursprung im Kontext der anderen Bahuvrīhi-Zusammensetzungen

- bzw. Hypostasen. Übersicht über die Rezeptionsgeschichte der früheren Forschung“. *SEz* 22, 133-154.
- 2000. „Die exozentrischen Zusammensetzungen mit Vorderglied Präverb/Präposition im R̥gveda: Entheos-Komposita und präpositionale Rektionskomposita“. En: Forssman/Plath 2000, 455-473.
- 2002. „Dvandva, Tatpuruṣa and Bahuvrīhi: On the Vedic Sources for the Names of the Compound Types in Pāṇini's Grammar“. *TPhS* 100, 351-402.
- Salus, Peter H.. 1965. „The types of nominal compound of Indo-European“. *Orbis* 14, 38-62.
- de Saussure, René. 1982. *La vort-teorio en Esperanto. Kun postparolo de André Albaut kaj bibliografio de Reinhard Haupenthal*. Saarbrücken: Artur E. Iltis (represo de la broŝuro de 1914).
- 2003. *Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto. Raporto al la Akademio Esperantista*. Elektronika libro s.l.: Inko (republikigo de la broŝuro de 1915).
- Schindler, Jochem. 1986. „Zu den homerischen ῥοδοδάκτυλος-Komposita“. En: Etter 1986, 393-401.
- 1997. „Zur internen Syntax der indogermanischen Nominalkomposita“. En: Crespo/García Ramón 1997, 537-540.
- Schubert, Klaus (eld.). 1989a. *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin – New York: de Gruyter.
- 1989b. „An unplanned development in planned languages“. En: Schubert 1989a, 249-274.
- Sennacieca Asocio Tutmonda (eld.). 2002. *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Sommer, Ferdinand. 1948. *Zur Geschichte der griechischen Nominalkomposita*. München: Bayerische Akademie der Wissenschaften.
- Starke, Frank. 1997. „Troia im Kontext des historisch-politischen Umfeldes Kleinasiens im 2. Jahrtausend“. *Studia Troica* 7, 447a-487a.
- Stepanowa, Marija D./Wolfgang Fleischer. 1985. *Grundzüge der deutschen Wortbildung*. Leipzig: Bibliographisches Institut.
- Støp-Bowitz, Carl. 1987. „Fakaj terminoj kaj vortstrukturo en Esperanto“. En: Mattos 1987a, 230-235.
- Szerdahelyi István (eld.). 1976a. *Esperantologiaj kajeroj I*. Budapest: Universitato Eötvös Loránd. Filologiscienca Fakultato.
- 1976b. „La Esperanta morfemaro“. En: Szerdahelyi 1976a, 61-117.
- Tichy, Eva/Dagmar S. Wodtke/Britta Irslinger (eld.). 2003. *Indogermanisches Nomen. Derivation, Flexion und Ablaut. Akten der Arbeitstagung der Indogermanischen Gesellschaft, Freiburg, 19. bis 22. September 2001*. Bremen: Hempen.
- Tischler, Johann. 1979. „Zu den syntaktischen Grundlagen der Nominalkomposition: Die Reihenfolge der Teilglieder“. En: Brogyanyi 1979 (parto II), 853-868.
- Tol, Sijmen/Hella Olbertz (eld.). 2006. *Bibliographie linguistique de l'année 2002 et complément des années précédentes*. Dordrecht: Springer.

- Uhlich, Jürgen. 1997. „Der Kompositionstyp „Armstrong“ in den indogermanischen Sprachen“. *HS* 110, 21-46.
- Verloren Van Themaat, Willem A.. 1972. „Fleksio, derivado kaj paradigma morfologio“. *Scienca Revuo* vol. 23/4, 121-133.
- Wacha Balázs. 1984. „Pri la radikkaraktero“. En: Rokicki 1984a, 95-101.
- Wackernagel, Jakob. 1957. *Altindische Grammatik*. Band II, 1: *Einleitung zur Wortlehre. Nominalkomposition*. 2a eld. Göttingen: Vandenhoeck & Ruprecht (1a eld. 1905).
- Weidmann, Dietrich M.. 1989. *Das Kausativ und das Antikausativ in der gemischten Plansprache Esperanto*. Schaffhausen: Weidmann's Mondo-Servo.
- Velger, Helmuto. 1994. *Kontribuoj al la norma esperantologio. Enkonduko, Ekspertizetoj, Kritikoj*. Marburg: info-servo.
- Wells, John. 1989. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. 2a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Wennergren, Bertil. 2008a. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Versio 14.1. Interreta eldono: www.bertilow.com/pmeg/ (2008-09-20).
- . 2008b. „Bazformoj de radikoj en vortaroj“. En: *Lingva Kritiko. Studoj kaj notoj pri la Internacia Lingvo. Esperantologio Interreta*. Interreta ĵurnalo: <http://lingvakritiko.com/2008/4/18/bazformoj-de-radikoj-en-vortaroj/> (2008-09-20).
- (eld.). 2008c. *Tekstaro de Esperanto*. <http://tekstaro.com/serchi/?&dosiero=tekstaro/index.html> (2008-06-20).
- Widmer, Paul. 2004. *Das Korn des weiten Feldes. Interne Derivation, Derivationskette und Flexionsklassenhierarchie: Aspekte der nominalen Wortbildung im Urindogermanischen*. Innsbruck: Institut für Sprachen und Literaturen der Universität Innsbruck (IBS 111).
- Zamenhof, Ludwik Lejzer. 1991. *Fundamento de Esperanto. Kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de D-ro A. Albaut*. Pisa: Edistudio.
- . 1992a. *Lingvaj respondoj. Plena kolekto*. Jekaterinburg: Sezonoj.
- . 1992b. *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto*. 18a eldono. Roterdamo: UEA.

Appendico: Malgranda terminaro vortfarada *de – eo*

Abstraktum	abstraktaĵo
Affix	afikso
Affixoid	afiksoido
Āmreĉita	amredito
Bahuvrīhi	bahuvriĥio
Basis	bazo
Binomen, Juxtaposition	dunominalo
Derivat	derivaĵo
Derivation	derivado
Determinativkompositum	determina kunmetaĵo
Dvandva	dvandvo
endo-/esozenŝriŝ	enentra
Endung	finajĵo
exozenŝriŝ	eksterentra
explizit	eksplica
Finaldetermination	alfina determino
Finalreaktion	fina rekcio
Flexionsmorphem	fleksia morfemo
frei	memstara, solstariva
Fugenelement, Interfix	interfikso
gebunden	nememstara
Grund-/Basismorphem	baza morfemo
Hinterglied, B-Konstituente	ĉefelemento
Hypostase (<i>malvastŝence</i>)	hipostazo
Hypostasierung	transpono
implizit	implica
Initialdetermination	alkomenca determino
Initialreaktion	komenca rekcio
Iterativkompositum	iterativa kunmetaĵo
Karmadhāraya	karmadarajĵo
Kategorialwort, -suffix	kategorivorto, -sufikso; kategoria finajĵo
Kollektivum	kolektivaĵo
Komposition	kunmetado
kompositionsähnliche Struktur	kunmeta derivaĵo
Kompositum	kunmetaĵo
Konfix	konfikso
Konkretum	konkretaĵo
Konstituente	konstituento
Konversion	konverto
Kopulativkompositum	kombina kunmetaĵo
Kurzwortbildung	kurtvortigo
Nomen actionis	agad-substantivo
Nomen agentis	agant-substantivo
Nomen instrumenti	instrument-substantivo
Nomen rei actae	agaĵ-substantivo
Paraphrase	parafrazo

Possessivkompositum	poseda kunmetaĵo
präpositionales Rektionskompositum	kunmetaĵo de prepozicia rekcio
Produktivität	produktiveco
Recharakterisierung	rekarakterizaĵo
Reduplikation	duobligo
reihenbildend	derivoviciga
Rückbildung	retroformaĵo
Stamm	stamo, †radikalo
Syntagma, Phrase	sintagmo, †frazo
Tatpuruṣa	tatpuruŝo
Ur-/Wortschöpfung	vortkreado
Verbales Rektionskompositum	kunmetaĵo de verba rekcio
Vorderglied, A-Konstituente	flankelemento
Wortart	vortospeco
Wortbildungsart, -prozess	vortfarada procezo
Wortbildungsbedeutung	vortfarada signifo
Wortbildungsdomäne	vortfarada sfero
Wortbildungskategorie	vortfarada kategorio
Wortbildungskonstruktion	vortfarada formaĵo
Wortbildungsmodell	vortfarada modelo
Wortbildungsmorphem	vortfarada morfemo
Wortbildungssynonym	vortfarada sinonimo
Wortbildungstyp	vortfarada tipo
wortfähig	vortkerniga
Wortklasse	morfemklaso, radikkaraktero
Wortkreuzung	vortfando
Wurzel	radiko
Zusammenbildung (<i>malvastsence</i>)	nominaligo de verba sintagmo
Zusammenrückung, Univerbierung	kunŝoviĝo
Zusammenrückung (<i>malvastsence</i>)	kunigaĵo
Zusammensetzung	kunmetado, kunmetaĵo

Zusammenfassung

Die vorliegende Arbeit „Wortbildung aus indogermanistischer und esperantologischer Sicht“ ist keine kontrastive Darstellung einzelner Wortbildungsmodelle, sondern ein Versuch herauszufinden, ob die Wortbildung des Esperanto mit den Mitteln (besonders den Termini) der klassischen Indogermanistik beschrieben werden kann. Anlass ist der Mangel an wissenschaftlichen Grammatiken des Esperanto in den Ethnosprachen und die idiosynkratische Terminologie der entsprechenden esperanto-sprachigen Werke. Besonderer Untersuchungsgegenstand sind komplexe nominale Bildungen mit mehreren Grundmorphemen, vor allem in altindogermanischen Sprachen.

Nach einer Kritik der traditionellen Wortbildungslehre werden in Kapitel 3.2 Kriterien und Ergebnisse einer neuen Einteilung vorgestellt. Die geläufigen Wortbildungstypen sind Dvandvas, Tatpuruṣas, Karmadhārayas, Bahuvrīhis, Zusammenbildungen (verbale Rektionskomposita) und Hypostasen (darunter präpositionale Rektionskomposita und *ént^heos*-Komposita), sowie die anderen expliziten und impliziten Derivate, Konversionen und Reduplikationen.

Auch die Esperanto-Wortbildung wird zunächst kritisch diskutiert. Dabei ergibt sich, dass weite Teile der von der Plena Analiza Gramatiko gelehrt und von der Esperanto-Akademie offiziellisierten Lehre wissenschaftlichen Kriterien nicht genügen und die Sprachwirklichkeit nicht wiedergeben. Daher wird in Kapitel 4.2 auch hier eine Neueinteilung vorgenommen.

Im Ergebnis lässt sich feststellen, dass das Esperanto als Wortbildungsmodelle Dvandvas (vom Typ neuerer indogermanischer Sprachen), Tatpuruṣas, Karmadhārayas und Hypostasen (im weiteren Sinne, alle komponierenden Ableitungen umfassend) und explizite Derivate aufweist, die mit den herkömmlichen Mitteln beschrieben werden können. Darüber hinaus findet sich aber als Besonderheit auch eine heterogene Gruppe häufiger Wortbildungsmittel (die so genannten „Affixe“), bei der noch nicht klar ist, ob über die praktische Zusammenstellung für den Sprachunterricht hinaus ein einigendes Band existiert, das eine Sonderstellung dieser Affixe, Affixoide (zweier Typen) und Wurzeln rechtfertigt. Im letzteren Fall hätte man es mit einer Besonderheit des Esperanto zu tun, die sich mit den Termini der Indogermanistik nicht erfassen lässt.

Streszczenie

Niniejsza praca pt. „Słowotwórstwo z punktu widzenia indoeuropeistyki i esperantologii” nie konfrontuje różnych modeli słowotwórczych, lecz jest próbą ustalenia, czy można opisać słowotwórstwo języka Esperanto środkami (przede wszystkim terminami) klasycznego językoznawstwa indoeuropejskiego. O wyborze tematu zdecydował brak gramatyk naukowych Esperanta w językach narodowych oraz niedostatki terminologii odpowiednich gramatyk esperanckich. Przedmiotem badania są przede wszystkim formacje imienne zbudowane z kilku morfemów, zwłaszcza w językach staroindoeuropejskich.

Krytyka tradycyjnej teorii słowotwórstwa wskazuje na konieczność nowej klasyfikacji (rozdz. 3.2), według której najczęstszymi typami słowotwórczymi są złożenia *dvandva*, *tatpuruṣa*, *karmadhāraya* i *bahuvrīhi* (w tym złożenia rekcji czasownikowej) i hipostazy (w tym złożenia rekcji przyimkowej i *ént^heos*) oraz inne derywaty oczywiste i domyślne, konwersje i reduplikacje.

Z krytycznego omówienia słowotwórstwa esperanckiego wynika, że część teorii słowotwórczej, której uczy Plena Analiza Gramatiko i którą uchwaliła Akademia Esperanta, nie spełnia wymagań naukowych i nie odzwierciedla rzeczywistości językowej. Z tego powodu w rozdziale 4.2 przedstawia się próbę nowej klasyfikacji słowotwórstwa Esperanto.

Badania prowadzą do wniosku, że modele słowotwórcze Esperanta to złożenia *dvandva* (jak w nowszych językach indoeuropejskich), *tatpuruṣa* i *karmadhāraya* oraz hipostazy (w szerszym znaczeniu, zawierające wszystkie derywaty złożone) i derywaty oczywiste, które można opisać terminami konwencjonalnymi.

Ponadto jednak istnieje niejednorodna grupa często używanych morfemów słowotwórczych (zwanych afiksami; składają się na ten termin afiksy, dwa rodzaje afiksoidów i rdzenie). Pozostaje niejasne, czy grupa ta ma tylko znaczenie praktyczne dla nauki języka, czy też można znaleźć cechy wspólne tych morfemów, które usprawiedliwiałyby ich odrębną pozycję w słowotwórstwie. W drugim przypadku mielibyśmy do czynienia z właściwością Esperanta, której nie sposób ująć terminami indoeuropeistyki.